

1980 oktobro

73-a jaro


n-ro 898(10)

aperas monate (escepte de aŭgusto)

esperanto

ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — 3015 bj rotterdam — nederlando



Movada revolucio en Irano

Vi trovos,

ke la longe atendata revunumero portas al vi la tutan movadan mondon en ĉi tiuj dudek kvar paĝoj. Vi certe rimarkis, ke nia revuo jam de pluraj jaroj tre sisteme zorgas, ke ĝiaj numeroj ne pleniĝu per eŭropaj movadaj novaĵoj. Se oni atente serĉas, tiam ja troviĝas amaso da ekstereŭropaj atentindaĵoj. Kiel ni skribis en la julia/aŭgusta numero ĉi-jare, la eŭropeco de la Movado estas pli mito ol realaĵo. Cetere, kion oni faras en tiu Eŭropo por Esperanto? Oni sieĝas la urbodomojn por havi plian Esperanto-straton en sia vilaĝo, oni kunvenas por spekti lumbildojn pri siaj feriaj vojaĝoj, oni aranĝas siajn ĉarmajn semajnfinojn, skisemajnojn, vinrikoltajn festojn kaj aŭtunajn balojn. Sed, homoj, en Irano popolamasoj lernas la Internacian Lingvon, en Pakistano kaj Hinda Unio oni prilaboras lernolibrojn kaj vortarojn. Same en Korea Respubliko. Simile en Brazilo kaj Kolombio. Kio gravas? Kiu pravas? Ni salutas, provizore.

Enhavo

- 161 Letero el Irano: 675 geinstruistoj lernas instrui Esperanton (Ĵila A. Sahab-Zamani)
- 162 Financo: Jam kvindek mil guldenoj ŝparataj ĉe UEA (Victor Sadler)
- 163 Kongreso de Blindaj Esperantistoj: Solidareco kun evolulandoj (Birger Viggen)
- 164 Brazilo, la unua sudhemisfera kongreslando: Por ĝui vaston de libera spaco (Leopold Knoedt)
- 165 Kie kunfandiĝas dioj kaj homoj (Jorge Amado)
- 166 Vojaĝo al la 66a UK: Kiel flugi al Brazilo?
- 167 Belartaj Konkursoj de UEA por 1980: Ĉu ni povas pli konscie mobilizi nin (Baldur Ragnarsson)
Tradukkonkursoj: Ĉiam pli multaj
- 168 Belartaj Konkursoj 1980: Originala poezio; Unua premio: Malice kontraste (Masayuki Kuroda)
- 170 Recenzoj: "Rikardo Tria" de Shakespeare / J. Francis (M. Nervi); "Lazur' kristala kaj pluv' susura" de M. Kuroda (P. Rados); "Riporto skribita en la pendumila maŝo" de J. Fučík / R. Hromada (W. Krikke); "Matenruĝo; La juneco en la tridekaj jaroj" de Kazuta Oka (R. Corsetti); "Du intervjuoj; Interparoloj kun K. Kalocsay kaj W. Auld" de R. Hauptenthal (B. Kolker)
- 172 Laste aperis. . . (novaj eldonaĵoj en aŭ pri la Internacia Lingvo)
- 173 TEJO-paĝo: 37a Internacia Junulara Kongreso: Vojoj al Meksikio; Orienta "Koncize"?
- 174 Kongresa komuniko (novaĵoj pri la 66a Universala Kongreso en Brazilo)
- 175 Kalendaro: Kio okazos ĝis marto?
- 176 Buĝeto de Universala Esperanto-Asocio por la jaro 1981
- 177 Loke — Fake — Persone (mallongaj novaĵoj)
- 178 Oficiala informilo el la Centra Oficejo de Universala Esperanto-Asocio
- 179 Kotiztabelo de UEA por la jaro 1981
- 180 Anoncetoj; Ekzameno E (Bernard Golden)

La kovrilo

Irano sur la kovrilo de periodaĵo ne estas surprizo dum la lastaj semajnoj, monatoj kaj eĉ jaroj. Bolas multo tie. Bolas ankaŭ la irana Esperanto-movado, kiu laŭ siaj amaseco kaj radikaleco ne trovas komparon en la memorebla historio de la Movado. Ĉu vi ankoraŭ memoras, ke la irana "Esperanto-revolucio" komenciĝis jam en 1977? Vidu nun, post kvar jaroj, aperas neniam signoj, kiuj dirus, ke temas pri tempe limigita kampanjo. Kampanjoj ne daŭras jarojn. Ĉu vi bonvolos ne kaptiĝi de la pasio, kiu interlinias la leteron el Irano sur la apuda paĝo, kaj rimarki la sobrecon de la iranaj argumentoj? Ĉu la cetera Esperanto-movado bonvolos kompreni la leteron el Irano, kiel alarmon, kiel ripe-tan postulon pri fundamenta ŝanĝo de la movadaj strategio kaj prioritatoj?

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Telefono: (010) 36 15 39.

Aperas monate (escepte de aŭgusto).

Fondita en 1905 de M. P. Berthelot (1881-1910). Legantoj en 91 landoj.

Redaktoro: Simo Milojević.

Abonprezo por unu kalendara jaro: 33,00 gld. (kun membreco kaj Jarlibro 55,— gld). Unuopa ekz. 3,— gld.

Anonctarifo (gld.): 1 p. 1000, 1/2 p. 530, 1/4 p. 290, 1/8 p. 170, 1/16 p. 110. Instancoj kaj entreprenoj de la Esperanto-movado rajtas rabaton de 50%. Eksterakovrilaj anoncoj kostas duoble. Ripetrabato 20%.

Banko: Bank Mees & Hope, Cool-singel 93, 3012 AE Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804).

Poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Telegramadreso:

ESPERANTO ROTTERDAM.

Estraro de UEA

Prezidanto kaj estrarano pri financo kaj administrado: s-ro Grégoire Maertens, Pr. Leopoldstr. 51, B-8310 Brugge, Belgio; tel. (050) 35 49 35.

Vicprezidanto kaj estrarano pri landa kaj regiona agado: d-ro Renato Corsetti, Via Strabone 1, I-00176 Roma, Italio; tel. (06) 29 26 07.

Vicprezidanto kaj estrarano pri kulturo: s-ro Baldur Ragnarsson, Sogavegur 170, IS-108 Reykjavík, Islando; tel. (91) 3 73 01.

Ĝenerala sekretario kaj estrarano pri planado: d-rino Flóra Szabó-Felső, Zója u. 5/b VII.22., H-7624 Pécs, Hungario; tel. (72) 23-274.

Estrarano pri informado kaj delegita reto: s-ino Ursula Grattapaglia, C.P. 04-0097, BR-70000 Brasília (DF), Brazilo.

Estrarano pri kongresoj kaj virina agado: s-ino Eliza Kehlet, Heideweg 20, B-2120 Schoten, Belgio; tel. (031) 51 46 36.

Estrarano pri faka agado: s-ro Petăr Todorov, ul. Veĵen 2, ap. 10, BG-1421 Sofia, Bulgario.

Estrarano pri esploroj, edukado kaj kunordigo de eksteraj rilatoj: prof. Humphrey Tonkin, Stouffer College House, 3700 Spruce St., Philadelphia, PA 19104, Usono; tel. (215) 382-5874.

675 geinstruistoj lernas instrui Esperanton

Irano spertas revolucion kaj militon. Tamen, eĉ en tiaj cirkonstancoj, la "irana Esperanto-revolucio" ne ĉesas arde flami. Laŭ lastatempa telefona komuniko, ne plu temas pri 500 sed pri 675 geinstruistoj, kiuj lernas instrui la Internacian Lingvon.

POST LA APERIGO de la ĉapitroj pri Esperanto en mezlernejaj sociologiaj lernolibroj en Irano (v. nian revuon de decembro, 1979, p. 202–3), rezultis, kiel antaŭvidite kaj eĉ iom planite, multnombraj konsekvencoj. Eble, antaŭ ĉio, por la esperantistaro de la mondo estas menciinda jeno:

1) Dekmiloj da gelernantoj kaj geinstruistoj, el la tuta lando, sendis al la Ministerio pri Edukado leterojn, telegramojn kaj skrib-rulaĵojn, kiuj enhavis:

a) dankojn pro la revolucia prezento de unu granda atingo homara en la sfero de la internacia kultura komunikado, tiel logike konstruita kaj facile lernebla, kiel Esperanto;

b) deklarojn kaj opiniojn, ke la ĝis nun instruitaj okcidentaj fremdaj lingvoj en Irano — kaj verŝajne ankaŭ en aliaj landoj de la Tria Mondo — vole-nevole, kaŝe-malkaŝe, konscie-nekonscie, bedaŭrinde, ĝenerale servadis kaj -adas kiel la umbilik-ŝnuroj de imperiismo kultura. Tial ili, tiuj ligoj, devus esti disnuditaj tuj post la liberiĝo de ĉiuj subpremataj popoloj;

c) petojn, ke la Ministerio ekplenumu revolucion agadon per la organizo de intensaj Esperantaj kursoj por la geinstruistoj. La Ministerio ankaŭ devus enkonduki Esperanton en la mezlernejajn programojn. En ĉirkaŭ ses monatoj, preskaŭ 84 000 voĉoj kun subskriboj tiucele venis al la Ministerio. Prof. M.H. Saheb-Zamani sukcesis kolekti la fotokopiojn de proksimume du trionoj de la alsenditaj leteroj, skrib-rulaĵoj ktp., kaj ekspozicii ilin.

2) Komence, multe da geinstruistoj pri fremdaj lingvoj iom kaj iel kontraŭstaris la movadon, pro la disvastigita onidiro, ke "ekde la venonta jaro oni anstataŭigos la anglan kaj la francan per Esperanto". Ili ektimis perdi sian laboron. Tamen, poste, pro la senĉesaj demandoj de gelernantoj, multaj el la instruistoj mem entuziasme volontuliĝis kaj, samvoĉe kun la aliaj, petis la Ministerion pri la baldaŭaj Esperantaj kursoj.

3) Lastatempe, la interesiĝo pri la Internacia Lingvo pli vaste kaj pli intense populariĝis en Irano. Jen en la lernejoj, jen en la moskeoj, universitatoj kaj en junulkluboj kreskadis kaj -adas fervore aroj da Esperantaj kursoj. Ekzemple, ĝis majo 1980, ekzistis nur en Tehrano 66 kursoj kun 3 125 gelernantoj en 3 universitatoj, 7 moskeoj kaj en 56 mezlernejoj.

Kaŭze de tiel granda demandado kaj premado, finfine, la Ministerio pri Edukado, vole-nevole, dissendis oficialan cirkuleron (la 22an de aprilo 1980), al la mezlernejoj de la tuta lando. Laŭ la cirkulero, ĉiuj geinstruistoj pri fremdaj lingvoj kaj sociaj studoj povus partopreni intensajn Esperantajn kursojn dum 22 tagoj.

La kursojn gvidis prof. Saheb-Zamani, s-ino M. Sagafian kaj la subskribinto. Unue oni anoncis, ke la loko konvenus nur por 300 personoj. Tamen, petis multe pli, kaj oni devis enskribi 500 geinstruistojn, 300 el Tehrano, kaj 200 el aliaj urboj iranaj. Tial oni devis ŝanĝi la lokon el iu lernejo al la iama klubo de usonanoj. Ĝi estas granda ĝardeno (30 000 kvadratmetroj), kiu nuntempe estas je la dispono de malriĉaj infanoj kiel sportejo.

La kursoj komenciĝis la 7an de junio kaj daŭris ĝis la 3a de julio 1980. Lastatage, laŭ la peto de 175 gestudentoj, oni daŭrigis la kursojn ĝis la 10a de julio. La ĉefkursoj funkciis dum 6 tagoj semajne, 3,5 horojn tage, plus minimume 2 horojn por hejmaj taskoj. Do, 66 instruhoroj, 44 ekzercohoroj, sume ĉ. 110 studhoroj en 28 organizitaj instrutagoj de Esperanto en Irano. Ĉu senprecedenca evento?

La Ministerio sugestis la starigon de la kursoj ekde la 22a de junio, ĉar ĝis tiu dato la plimulto de geinstruistoj estis okupita pri la lernejoj finekzamenoj. Krome, la plimulto de la kurspetintoj deziris, ke la kursoj okazu posttagmeze. Tamen, konsiderinte ke temas pri 30 000 mezlernejaj geinstruistoj, kaj -- aliflanke -- povinte respondi adekvate al maksimume 500 kursanoj, oni intence decidis komenci la kursojn 16 tagojn pli frue kaj matene. Tiele estiĝis ia konscie kaj zorgeme planita selektado. Ariĝis, unuafoje, en la "Irana Esperanto-ĝardeno" — oni nomis ĝin tiel — kvincent potencialaj amantoj de la homara amikeco, ĉiutage frumatene, por akiri la necesan komunikilon, por iĝi batalontoj de nia Movado. Multaj eĉ volonte rezignis pri aliaj aferoj, por iĝi studentoj de la Internacia Lingvo.

Amasiĝis jam antaŭ la kursokomenco pli ol 300 aliaj allogitaj volontuloj ege petante partopreni la kursojn sed, bedaŭrinde, vere ne plu oni povis akcepti ilin. Anstataŭe, oni decidis starigi aliajn kursojn post la islama fasta monato Ramadano, de la 16a de aŭgusto 1980. Laŭpete, oni havos ankaŭ perfektigan kurson por ĉirkaŭ 200 jam lernintaj geinstruistoj.

En la kursoj partoprenis ankaŭ 15 jamaj lernintoj, kiel estontaj instruantoj. Krome, kunlernis du universitataj profesoroj kaj du radio-ĵurnalistinoj.

En la unua tago oni disdonis al la kursanoj demandaron kun 35 demandoj pri Esperanto, por identigi la antaŭjuĝojn kaj antaŭsciojn. La lastan tagon de la kursoj oni denove disdonis la saman demandaron kun 5 pliaj demandoj, por eltrovi la ŝanĝojn kaj aktivajn sciojn de la kursanoj. Ĉar dum tiu periodo oni devis akiri ankaŭ teoriajn konojn i.a. pri ekonomiaj, psikologiaj kaj sociologiaj aspektoj de Esperanto.

Unu kursanino verkas sian magistran tezon pri "Esperanto kaj internaciaj kulturaj rilatoj". Ŝi studas en la Universitato Farabi en Tehrano, kies respondeculoj akceptis la tezon oficiale, kondiĉe, ke ŝi mem scipovu la lingvon. Ankaŭ la menciitaj demandaroj estos je la dispono de tiu studentino.

Responde al unu el la 35 demandoj — Kial vi volas lerni Esperanton? — la kursanoj, ĝenerale, montris tre bone, ke ili estas klare cel-konsciaj:

Ili ne volas lerni facilan, muzike belan lingvon pro nura libertempa amuziĝo aŭ pura estetika plezuro; ili ne volas lerni Esperanton por interŝanĝi poŝt-markojn, muzikdiskojn ktp. internacie, por korespondado pri botaniko, muziko, sporto ktp., por tranokti senpage pere de la Pasporta Servo en iu ajn lando dum iu vojaĝo, por trovi kunulon aŭ kunulinon en nudista kampadejo en iu okcidenta lando pere de anoncetoj, por legi originalan aŭ Esperante tradukitan poemon, romanon, dramon (kiel *Hamleto*, *Faŭsto*, *Rubajoj de Kajjamo* ktp).

Tamen ili deziras, eĉ volegas lerni Esperanton! Kaj kial? Ĉar: a) ili kredas, ke Esperanto estas universala, supernacia, sen kulturimperismaj altrudoj; b) pere de Esperanto oni esperas povi liberigi sin de la scienc-teknika malriĉo de la Tria Mondo; c) helpe de Esperanto oni deziras ludi iun estimplenan roletan en la internacia kultura areno, profiti de ĝi kaj eble ankaŭ kontribueti al ĝi science, ekonomie, humane kaj eĉ teknike.

Jes, tio estas la nova esperantismo, en la Tria Mondo. Kaj tial ili proksimiĝas al Esperanto kaj en ĝi serĉas



"Esperanto Internacia Lingvo, nek orienta nek okcidenta, sed homara": E-kurso en la Universitato de Ahvas.

kompenson por siaj mankoj. Estus katastrofo, kultura kaj ideologia katastrofo, se ili ne trovus sian de longe revitan perdon en Esperanto. Tiam Esperanto, sen-revene forlasita, mortus por ĉiam en la Tria Mondo. Tio ĉi, espereble, estas ĝustatempa morala admono al la okcidenta esperantistaro, alarmosignalo por tiuj kleruloj, kiuj ne konscie viktimigas la ĉefajn, primarajn principojn pro la sekundaraj malgravaĵoj en Esperanto. Tio ĉi estas admono al tiuj, kiuj anstataŭ pripensi kaj zorgeme verki, traduki, eldoni kaj aldoni al la nuntempe malriĉa scienc-teknika literaturo de Esperanto, ege bedaŭrinde, perdadas la multvaloran tempon pri tro pedantaj, luksaj akademiaj disputoj kaj temoj.

Ni instigadas la intereson de la amasa publiko en Irano pri Esperanto, sed ni solaj certe neniam povos adekvate

FINANCO:

Jam kvindek mil gld. ŝparataj ĉe UEA!

EN LA NOVAJ ŜPARKONTOJ ĉe UEA jam troviĝas ĉirkaŭ kvindek mil guldenoj. Tiun estimindan sumon deponis la unuaj dek ŝparantoj: 8 individuaj membroj, unu internacia faka organizaĵo kaj unu landa junulara asocio. Ili ricevos renton de 6% jare.

Jam antaŭ unu jaro ni anoncis, ke la Komitato de UEA decidis starigi tiajn ŝparkontojn por tiuj, kiuj deziras investi iom da kapitalo ĉe la Asocio. Intertempe pretiĝis detala regularo pri tiuj kontoj. La bazaj principoj estas: ke oni povas deponi ĉiun ajn sumon, sed ne malpli ol mil guldenoj; ke la rento aldoniĝas post ĉiu plena jaro; ke tamen oni povas ĉiam libere ricevi la monon, se oni urĝe bezonas ĝin (tiuokaze oni perdas la renton por tiu parto de la jaro, kiu pasis de post la lasta rentokalkulo).

Kiajn avantaĝojn tiuj ŝparkontoj havas por la membroj? Unue, temas pri investo en guldenoj. La neder-

landa mono estas unu el la plej fortaj valutoj de la mondo. Tio signifas, ke per investo en guldenoj oni povas ĝui konsiderindan kurzogajnon, kiam oni poste reprenas la monon. Ekzemple, se dum la jaro la mono de via propra lando malplivaloriĝas je 10% kompare kun la guldeno, vi poste ricevos, en via propra valuto, krom la rento ankaŭ pliajn 10%, simple pro la kurzoŝanĝo. Due, la fiksita rento de 6% estas en si mem jam sufiĉe alloga.

Ĉu do temas nur pri plia servo de UEA al la membroj? Nu jes. Tamen ankaŭ UEA havas avantaĝon el la afero! Por fiksdaj deponoj ĉe nederlandaj bankoj oni povas ricevi en la lastaj jaroj renton de pli ol 10%, se oni deponas minimume po 25 000 guldenoj. Tion la unuopaj membroj, kiuj havas po mil aŭ kelk-mil guldenojn por depono, ne povas atingi, kompreneble. Sed, se UEA kolektas de multaj ŝparantoj tiajn malpli grandajn sumojn, ĝi mem povos fari la grandajn deponojn kaj gajni 10%! Eĉ post elpago de 6% al la ŝparantoj kaj subtraho de la kosto de la administra laboro, restas bela profito por la Asocio.

Jam kelkaj personoj demandis, ĉu ili devos pagi imposton je la rento de siaj deponoj. Kompreneble, tio dependas de la leĝoj en la lando, kie ili loĝas. Tiu,

respondi ĝian grandan sciencetnikan malsaton. Vi devus helpi, eĉ helpigi nin. Nu, ĉu oni aŭdas nin tie en la sciencoriĉa, kultura Okcidento? Ĉu ni povis komprenigi nin sufiĉe bone?

* * *

En la komenco, dum kvin tagoj, ĉiuj 500 kursanoj estis kune, en unu eĉ por Irano senprecedence amasa kurso. Sed, ekde la sesa tago oni dividis la kursanojn en tri subgrupojn. Ankaŭ la instruprogramo havis tri partojn: gramatiko, legado-tradukado, konversacio. Lastatage oni redaktis kaj subskribis rezolucion de la iranaj mezlernejaj geinstruistoj pri kaj por Esperanto. Meze de la tria kursosemajno okazis libroekspozicio. Ni disdonis ankaŭ 700 fotokopiojn de la paĝo kun la rubriko "Esperanto en radio" el la revuo *Esperanto*.



Prof. M.H. Saheb-Zamani antaŭ parto de la grandega kurso en la "Irana Esperanto-Ĝardeno" en Teherano.

kiu ŝparas ĉe UEA, devas mem koni la impostoleĝojn de sia propra lando kaj agi konforme al ili. Cetere, la financa administrado de UEA estas regule kontrolata, krom de la profesiaj revizoroj, ankaŭ de la nederlandaj impost-inspektoroj.

Necesas emfazi, ke ĉi tiu nova ŝparsistemo neniel celas konkurenci kontraŭ Instituto Hodler '68 — tiu aparta instanco, kiun UEA starigis por investi kapitalon profite al la Esperanto-movado. La kapitalo de Instituto Hodler konsistas plejparte el donacoj kaj senrentaj pruntoj. Kontribuis kaj kontribuas al ĝi homoj, kiuj pretas oferi aŭ la kapitalon aŭ ĝian renton por la bono de Esperanto, kaj kiuj ne mem bezonas tiun monon. Ekzistas, tamen, multaj aliaj homoj, kiuj volonte helpas la Movadon sed ne povas mem rezigni pri la rento. Por ili estas kreitaj la novaj ŝparkontoj de UEA, ĉar la ŝparanto ricevas bonan renton kaj tamen, kiel ni klarigis ĉi-supre, finance subtenas la Asocion.

Se vi disponas liberan kapitalon de minimume mil guldenoj kaj volonte deponus ĝin por unu aŭ pluraj jaroj ĉe UEA kontraŭ sesprocenta rento, skribu poŝtkarton al la Centra Oficejo kaj petu la detalan regularon kaj respondilon.

V.S.

Tamen, nuntempe oni ĉi tie povas aŭskulti nur la elsendojn el Pekino. Tuta grupo da profesiaj kaj multaj amatoraj fotistoj tre aktivis dum la kurso kaj oni ĝis nun sukcesis vendi fotojn por la sumo de ĉ. 5 800 guldenoj.

Ĝenerale, plejmulto forlasis la kursojn kun granda fido je Esperanto, pretaj sincere helpi al la progresigo de la Internacia Lingvo. Kaj ĉio ĉi, mirinde, okazis en tempo ege griza en Irano, kiam vere nenio estas eĉ iomete facila, kiu ankoraŭ rapidege disvolviĝas kaj pro kiu nenio estas antaŭvidebla.

Ĵila A. Saheb-Zamani

KONGRESO DE BLINDAJ ESPERANTISTOJ:

Solidareco kun evolulandoj

Inter la 9a kaj 16a de aŭgusto okazis en Lidingö, antaŭurbo de Stokholmo, la 48a Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj. Ĝin partoprenis 118 personoj el 17 landoj.

Krom la ĝeneralkunvenoj de Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj (LIBE), la plej grava punkto en la kongresa programo estis seminario sub la titolo "Solidareco al la blinduloj en la evolulandoj". La enkondukan prelegon faris la ĝenerala sekretario de la Tutmonda Konsilantaro de Blinduloj, la svedo Anders Arnör. La prelego estis anticipe sendita al tiuj, kiuj anoncis sian partoprenon en la Seminario. La partoprenantoj estis petitaj informiĝi pri sialandaj agadoj rilate al internacia solidareco koncerne la viddifektojn kaj la Internacian Jaron de Handikapuloj, 1981, proklamitan de UN. La materialo estis pritraktita en grupoj kaj plenkunsidoj. Sufiĉe longa rezolucia teksto rezultis el la Seminario.

Ĉar la kongresejo estis sportinstituto, ni kaptis la okazon dediĉi certan tempon al sansporto kunlabore kun la Sveda Sportasocio de Handikapuloj. Naĝejo kaj sportejoj estis je nia dispono. La plej populara montriĝis elektronika celpafado, inventita antaŭ kelkaj jaroj. La celtabulo estas kolorigita laŭ griza skalo de la blanka centro ĝis la nigra periferio. Tiu tabulo estas lumigita de reflektoro en prefere malluma ĉambro. Lumoreaga instrumento sur la pafilo transformas la lumskalon en sonskalon de intensa tono, kiu indikas la centron, ĝis pli kaj pli malaltfrekvenca tono. La tono estas aŭdita helpe de kapaŭdiloj. La rezultoj, kiel kutime, variis de pafoj ekster la tabulo ĝis 10 poentoj. Mi volas mencii ankaŭ la kulturaranĝojn, al kiuj kontribuis pluraj altkvalitaj profesiaj artistoj, inter ili la kantistoj Sultanka Mineva kaj Stefan Paskulov el Bulgario, la koncertpianistoj S. Schmalzl el Aŭstrio kaj J. Lenyei el Svislando.

La venontjaran kongreson promesis aranĝi la jugoslavoj en Zagrebo.

Birger Viggen

BRAZILO, LA UNUA SUDHEMISFERA KONGRESLANDO:

Katedralo
de Brazilio grandparte
simblas la tutan
arkitekturan novecon
de la brazila ĉefurbo.



Por ĝui vaston de libera spaco

KIAM fine de julio 1981 vi alvenos en Brazilio por partopreni la 66an UKon, se vi ne estas brazilano, vi eble ricevos ŝokon, sed, kiel bona esperantisto, baldaŭ hejmiĝos en la urbo. Ĉar Brazilio, se vi komparos ĝin al via hejmurbo, spertis ion similan al tio, kio okazis kun Esperanto kompare al via gepatra lingvo. Dum la etnaj lingvoj kaj la antikvaj urboj estis konstruitaj laŭhazarde, sen ia planado, Brazilio, same kiel Esperanto, obeis racian planon.

Nun, post dudek jaroj, Brazilio jam fariĝis la definitiva hejmo de enmigrintoj el ĉiuj ŝtatoj de Brazilo, sen paroli pri la denaskaj brazilanoj. Ili ĉiuj ja estas el karno kaj ostoj, kaj estas ili, kiuj donas vivon kaj propran karakteron al la urbo. Larĝaj, senkruciĝaj avenuoj, orde lokitaj registaraj konstruaĵoj, proprastilaj ambasadoj, apartaj kvartaloj de loĝblokoj, komerco, bankoj kaj hoteloj, ĉio pulsas je vigle freŝa vivo. Dume ankaŭ la unuaj plantidoj evoluis al frondoriĉaj arboj kaj, kune kun granda lago kaj multaj razenoj kaj florbedoj, ili ornamas la urbon, kiel poezio ornamas lingvon, eĉ se planitan. Do venu al Brazilio por ĝui ĝian vastan liberan spacon, ankaŭ figure, ĉar en la ekumena katedralo vi same povas ĉeesti katolikan meson kiel alikonfesian diservon, dum viajn okulojn ravis la efekto de sunradioj iluminantaj la internon, post rebrilo en akvo ĉirkaŭanta la konstruaĵon.

Post la kongresa semajno vi nepre devas viziti aliajn partojn de Brazilo, por pli bone profiti el vojaĝo tiel malproksimen. Se vi venis el la norda hemisfero, meze de via somero, en Brazilio vi trafos tre mildan vintron. Se tamen vin logas malvarmo, iru al la plej sudaj ŝtatoj: tie vi havos eble minus 4°C kaj iom da neĝo. Se male la varmeto de Brazilio ne sufiĉos, elektu Manaus kun ĝiaj plus 40°C. Proksime de tie vi ĉeestos la "renkontiĝon de la akvoj", kie la malhela fluo de la Rivero Nigra akompanas dum multaj kilometroj, senmikse, tiun de Amazono. Ankaŭ indianojn vi vidos (rapidu, antaŭ ol ili malaperos) kaj rarajn manĝaĵojn vi frandos el fiŝo aŭ testudo, birdo aŭ rampulo, mambesto akva aŭ tera, kaj deserte la plej delikatajn tropikajn fruktojn.

Se kontraŭe vi volas bani vin en tepida bluverda maro kaj marŝi laŭ multaj kilometroj da seninterrompa blanka fajna sablo de strandoj, borderitaj per kokospalmoj, venu al la nordoriento. Precipe al Salvador, la unua ĉefurbo de la lando, kun la plej granda kolekto de baroka arto en unu sama loko, ĝia milda klimato, dum monatoj varianta inter 21° kaj 26°C, ĝiaj apenaŭ tuŝitaj afrobrazilaj religio kaj folkloro.


Ankaŭ en la centra ŝtato Minas Gerais vi trovos multajn memorigaĵojn pri nia ora epoko — vere ora, ĉar pro tiu metalo grandkvante elfosita el la grundo, eblis subteni malavare arkitektojn kaj artistojn. Inter tiuj troviĝas la mondfama "Aleijadinho" (prononcu: alej-jadinjo), t.e. "La Kriplulo", kiu ĝis la fino de sia longa vivo, duonblinda kaj kun la ĉizilo ligita al la pulso, konstruis kaj skulptis el ligno kaj sapoŝtono, inter aliaj la dek du nature grandajn profetojn laŭlonge de preĝeja ŝtuparo.

Nepre vizitu la Kataraktojn de Iguaçu (igŭasu'), ĉe la argentina landlimo. Ili formas hufieron ĉirkaŭ 4 kilometrojn larĝan. Multaj insuletoj, rokaj aŭ arbokovritaj, dividas la riverfluan en preskaŭ 300 akvofalojn, kiuj plonĝas de 60 ĝis 80-metra alteco en la "Gorĝon de l' Diablo", kvazaŭ "oceano plonĝanta en abismon". En la plua sezono estas ja 16 000 litroj en sekundo, kiuj dividiĝas en milojn da individuaj faletoj desur elstarantaj rokoj. La rezultanta devio de la akvo, kune kun la nebulo leviĝanta ĝis 150 metrojn, kreas baraĵon de spektaklaj ĉielarkoj. Ambaŭflanke de la rivero situas naturparkoj, prizorgataj de la du landoj.

Vi certe ne forlasos nian landon sen meti oran sigelon sur vian vojaĝon, pere de vizito al Rio de Janeiro, la iama ĉefurbo. Ĝiaj plaĝoj, inter ili Copacabana (kopakabana) ja meritas sian mondfamon, same kiel Monto Corcovado (korkovado) kun sia 30 metrojn alta, nokte iluminita Kristo-statuo, la konata monto Sukerpano, la arbaro de Tijuca (tiĵuka) kaj la perlo de la Golfo de Gŭanabara, la Insulo Paquetá (paketa'), kie motorveturiloj estas malpermesitaj.

Fine de via vojaĝo vi bedaŭros, ke ĉi-foje vi ne povas resti pli longe por viziti la multajn aliajn vidindaĵojn.

Leopold Knoedt



Amazono estas la akva miraklo de la brazila nordo, kaj la akvofaloj de Iguaçu (foto) meritas tiun titolon en la sudo.

Kie kunfandiĝas dioj kaj homoj

BRAZILO estas lando de rasa kunfandiĝo. Tio estas evidenta, nekontestebla fakto. La brazila eksperimento havas egan gravecon en la serĉo por solvo al la terura rasproblemo, kiu aflikta la mondon. Ĉar en Brazilo, la plej diversaj rasoj konstante miksiĝis.

Kiu brazilano povus honeste pretendi "puran" devenon en lando, kie iberoj, slavoj, anglosaksoj, madjaroj kaj aliaj nedisigeble sin miksis kun nigraj kaj indianaj popoloj kaj kun araboj, judoj kaj japanoj?

Tiu daŭra procezo estas la fundamenta realo de la brazila vivo, kaj ĝi reprezentas nian propran apartan kontribuon al la mondaj kulturo kaj humanisma tradicio.



Rasa harmonio en Brazilo: Detalo de la pentraĵo "La tri rasoj" de la brazila pentristo Emiliano Cavalcanti.

Ni estas miksrasa popolo, kaj la miksaĵo dependis same multe de la kontribuo de la negroj kiel de tiu de la blankuloj. Ni ŝuldas al la nigraj popoloj iujn el niaj plej elstaraj karakterizoj: ekzemple, nian kapablon elteni mizeron kaj subpremon, travivi en la plej malfavoraj kondiĉoj, kaj ami la vivon kaj ridadon.

Al ili ni ŝuldas la senĉesan ĝojon, kiu inspiras niajn klopodojn kontraŭbatali kaj venki malprogresemon, malriĉon kaj la multajn obstaklojn sur nia vojo al evoluo. Ni ŝuldas tiun rezistemon kaj luktemon al la negra sango kiu fluas ne nur en niaj vejnoj sed ankaŭ en niaj muziko, danco kaj aliaj formoj de arta esprimiĝo.

La brazila kulturo formiĝis en la lukto kontraŭ rasismo kaj naskiĝis el la kunfandiĝo de blankuloj, negroj kaj indianoj. La negra elemento en la brazila socio estas nedisigeble kunfandita kun la blankula, kaj Afriko patrinece enestas nian ĉirkaŭaĵon.

Sed estus ridinde pretendi, ke ne troviĝas rasistoj en Brazilo, ĉar estas tie multaj. Aliflanke, ni ne havas rasisman vivfilozofion: nia mondrigardo estas fundamente kontraŭrasisma, ĉar bazita sur kunfandiĝo.

La vivoplena "negra" arto de la skulptisto Agnaldo da Silva, sen egalo en la hodiaŭa Brazilo, ne estas ekskluzive negra. Ĝi portas spurojn de blankulo kaj ibera influoj kaj en formo kaj en temo: la "Oxossi" de Agnaldo estas ankaŭ Sankta Georgo.

Estas des pli bedaŭrinde, do, ke al eksterlando oni kelkfoje prezentas misformitan bildon de nia vivmaniero. La afrikan kontribuon, kiu havas fundamentan

gravecon en la brazila kulturo, oni preterglitas aŭ puŝas en la fonon.

Tio estas tute falsa vidpunkto. Pro kurioza inversigo de la kolonia pensmaniero, ekzistas emo elstarigi la pentristojn, verkistojn kaj kantistojn kun kiel eble plej nigra haŭto. Tiu klopodo pruvi la neekziston de rasaj antaŭjuĝoj en Brazilo fakte indikas obsedon, kiu estas tute fremda al la brazila vivfilozofio.

La plej nigrajn knabinojn oni elektas por kanti, sed ne atentis la fakton, ke ili prezentas kantojn, kiuj montras pli fortan iberan ol negran influon, kvankam la brazila muziko devenas ĉefe de la atabakoj* de Afriko.

La pentraĵoj ekspoziciataj emas esti tipaj ekzemploj de la pariza skolo — gravas nur, ke la haŭto de la artistoj estas nigra. Brazilajn pentristojn kiel Tarsila kaj Di Cavalcanti oni neglektas, kvankam iliaj verkoj montras la negrajn afrikajn influojn kiuj, kune kun la blankulaj, indianaj kaj japanaj elementoj, produktis arton, kiu estas unike brazila.

Ni devas proklami al la mondo ĝenerale la enorman gravecon de la afrika ĉeesto en Brazilo, en nia vivo, nia kulturo kaj en la vizaĝoj de nia popolo.

La nigra afrikano kontribuis al ĉiuj grandaj atingoj de Brazilo. La ĉeeston de Afriko kun ties sunlumo kaj

*atabako: alta tamburo de afrika origino.

ombro sentigas la profetojn, sanktulojn kaj anĝelojn, kiujn formis la mestiza skulptisto Aleijadinho (1730-1814) en la minregiono Minas Gerais.

Afriko ĉeestas la muzikon de Villa Lobos kaj Dorival Caymini, la oriŝojn** kaj madonojn de Agnaldo, la poezion de Gregório de Matos, Castro Alves kaj Vinícius de Moraes. Ĝi enestas la dancadon kaj la kantadon, la mildecon, la amikecon kaj la disvastiĝeman fantazion de ĉio granda en Brazilo.

Ĉar ĉi tie en Brazilo dioj kaj homoj fariĝis, feliĉe, nedisigeble kunfanditaj.

Jorge Amado

(El *Unesko-kuriero* tradukis C.R.L. Power.)

**oriŝo: okcidentafrika dio; per sinkretismo ofte identiĝas kun kristana sanktulo.

NOTO PRI LA AŬTORO: Jorge Amado (1912-) estas la plej konata nuntempa romanisto brazila. Ne ekzistas romano pli ŝatata en Brazilo ol lia *Gabriela, kariofilo kaj cinamo* (1958), kvankam *Dona Flor kaj ŝiaj du edzoj* (1967), pro sukcesega kina adaptaĵo, verŝajne havas pli da famo internacie. Inter liaj aliaj romanoj estas *La morto kaj la morto de Kinkas Akvokrio* (1961), *Tendo de mirakloj* (1970), *Tereza Batista laciĝinta de luktado* (1972) kaj *Tieta de Agresto* (1977). Amado bedaŭrinde ankoraŭ ne estas reprezentita per tradukoj en la Internacia Lingvo.

VOJAĜO AL LA 66a UK:

Kiel flugi al Brazilo?

POR LA PLIMULTO de la partoprenontoj de la 66a UK venontjare en Brazilo, la plej granda demando estas, kiel atingi la kongreslandon, kiel flugi tien. Tio koncernas la eŭropanojn, japanojn, aŭstralianojn, kaj — en iom malpli forta formo — la sama demando stariĝas antaŭ la nordamerikanoj kaj eĉ antaŭ sudamerikanoj mem. Tial UEA ĉi-foje zorgas ne nur pri la organiza flanko de la Kongreso, sed ankaŭ pri la demando, kiel atingi la kongresajn landon kaj urbon. Multmonata ĝisnuna traktado kun tuta aro da flugkompanioj kaj vojaĝagentejoj evidentigis, interalie, ke en la mondo de la aera transporto regas kompleta ĝangalo tarifa, rabata, jura ktp. Aldone al tio, dum la lastaj jaroj la aera trafiko spertas veran revolucion. Ĝi koncernas ankaŭ la tarifojn, kiuj — feliĉe — fariĝas ĉiam malpli altaj. Tiu revolucio, tamen, ĝis nun komplete disflamiĝis nur en la trafiko inter Norda Ameriko kaj Eŭropo, kaj parte ankaŭ inter Eŭropo kaj Azio. Sed, kiel flugi al Brazilo venontjare?

Normala senrabata flugbileto por revenvojaĝo inter, ekzemple, Amsterdamo kaj Rio-de-Janeiro kostas ĉ. 5000 guldenojn. Aliflanke, aventurema unuopulo povas provi fari la saman vojaĝon por malpli ol duono de tiu sumo. Tamen, la validaj reguloj por ĝui tiun duonan tarifon estas tiaj, ke ili tre evidente promesas amason da

malĝuo en la formo de neeblo akiri lokon en la dezirata flugo, maltrafo de konekta flugo kaj devo perdi la pagitan sumon kaj elspezi denove por plentarifa bileto. Tiaj "eblecoj" de malmultekosta flugo al Brazilo devis forfali el la planoj de UEA, kiu kunlaboras nur kun la plej bonaj flugkompanioj kaj vojaĝagentejoj. Kio do restis por tiuj, kiuj flugos el Eŭropo al Brazilo?

Minimуме kvin diversaj aranĝoj troviĝos en sia definitiva formo en la Dua Bulteno, kies aperigo estas atendata fine de ĉi tiu jaro. La plej simpla el tiuj vojaĝeblecoj koston ĉ. 3500 gld. kaj inkluzivos ne nur la flugan rev- enbileton, sed ankaŭ dusemajnan restadon en Brazilo. Alia programo, kies kostoj estos ĉ. 5500 gld., antaŭvidas trisemajnan vojaĝon tra Brazilo, Bolivio kaj Peruo, kun vizitoj al la famaj monumentoj de la praaĵ sudamerikaj civilizoj kaj al la lokaj esperantistoj, kiuj bezonas tiaspecan apogon. Planoj antaŭvidas pli longan sandirektan vojaĝon, kiu inkluzivus ankaŭ Ekvadoron kaj Kolombion. Alidirekta plano celas daŭrigon de la brazila vojaĝo al Buenos Aires kaj Montevideo en la sudo. Preskaŭ ĉiuj vojaĝplanoj inkluzivas antaŭ- aŭ post-kongresan viziton al Rio-de-Janeiro, San-Paŭlo kaj la akvofaloj de Iguaçu ĉe la argentina kaj paragvaja landlimo de Brazilo. Dum en Brazilio la programoj inkluzivas nur hotelon kun matenmanĝo, ekster la kongresa urbo la prezon enestas ĉiuj ekskursoj kaj ofte ankaŭ aliaj manĝoj. Eblos komenci iujn el la vojaĝoj, sen ekstraĵ kostoj, el diversaj partoj de Eŭropo. Pacienca do kaj atendu la aperon de la Dua Bulteno en decembro ĉi-jare!

Ĉu ni povas pli konscie mobilizi nin?

En Stokholmo, dum la 65a UK, Belartaj Konkursoj de UEA havis sian 30an datrevenon. En sia parolado tie Baldur Ragnarsson, prezidanto de la juĝkomisiono de la Belartaj Konkursoj, diris, ke dum tiuj 30 jaroj la nombro de la konkursaĵoj atingis la imponan sumon de 2 400, dum la nombro de premioj estas 350. La rezultoj de la ĉi-jaraj Belartaj Konkursoj aperis en nia septembra numero (p. 155). Ĉi tie ni publikigas la plej interesan parton de la parolado de Ragnarsson en Stokholmo. Plurrilate ĉi tiu teksto povas servi kiel "inaŭgura parolado" de la nova vicprezidanto de UEA kies specifa estrara tasko estas la Esperanta kulturo.

... ĈI-JARE ni rajtas fieri pri io eksterordinara: granda konkurso de romanoj vartiĝis inter la limoj de la Belartaj Konkursoj. Temas pri la Premio Raymond Schwartz.

Raymond Schwartz mortis la 14an de majo 1973, estante 79-jara. Ĉiu esperantisto, orientiĝanta pri la originala literaturo en Esperanto, rekonas lian elstare krea aplikon de la lingvo, precipe sur la kampo de prozo. Lia verkista evoluo konstateblas tra jardekoj da riĉe rezulta laboro, en poemoj, noveloj, romanoj kaj

prilingvaj eseoj. Pri lia ĉefverko, la romano *Kiel akvo de l' rivero*, Juan Régulo Pérez skribis presente je ĝia apero en 1963: "Ĉi tie do, la unuan fojon, kuŝas antaŭ ni verko, kies dimensioj kaj arta konstruo metas ĝin nete en la familion de la grandaj romanoj."

En marto 1975 aperis en *Esperanto* de UEA mallonga informo pri tio, ke al la adreso de tiu organizaĵo venis donaco de 4 300 guldenoj, kun indiko, ke tiu mono efektivigu konkurson pri ampleksa proza verko en la Internacia Lingvo, kaj ke la Estraro de UEA interkonsentis kun la donacinto, ke la konkurso nomiĝu "Konkurso Raymond Schwartz". En decembro samjare aperis definitiva anonco pri la konkurso. Laŭ ĝi, la Premio estos aljuĝita en 1980 al la plej alte taksita "ankoraŭ ne eldonita proza fikciaĵo en Esperanto", prezentita al la juĝkomisiono. Lasta anonco pri la Konkurso aperis en 1978, en la julia-aŭgusta numero de *Esperanto*; tie W. Auld, estrarano pri kulturo, instigvorte memorigis pri la Premio, sub la optimisme fida titolo: "Por proza renesanco".

Ke la memorigo de Auld donis frukton, la unua povis konstati la sekretario de la BK, kiam, je la fino de pasinta septembro, estis atingintaj lin 10 manuskriptoj por la romankonkurso, ampleksantaj sume 2 254 tajpitajn paĝojn. Konsiderante la dumlonge nekontentigan staton de tiu ĝenro en la literaturo de Esperanto, ni ja trovis tioman rikolton evento neatendita. Ŝajne ni

TRADUKKONKURSOJ:

Ĉiam pli multaj

SUB AŬSPICIO de la Belartaj Konkursoj de UEA okazas tradukkonkursoj en la diversaj nacilingvaj teritorioj, se montriĝas intereso pri tio. En la kadro de BK en Stokholmo rezultoj en kvar tiaj konkursoj estis raportitaj. Pro tradukoj el la **finna** en Esperanton gajnis premiojn Henrik Tikkanen, A. Harju kaj Terttu Tyynelä, el la **franca** A. Gilles, H. Gonin kaj H. Kristos-Bonis, el la **germana** J. Dörr, W.P. Roelofs kaj K.-D. Dungert, kaj el la **itala** P.G. Soranzo, N. Rossi, C. Conterno kaj G. Roattino. Pri la tradukkonkursoj zorgis la koncernaj landaj asocioj. Okazis ankaŭ tradukkonkurso por **nederlandlingvanoj** en kiu la premiojn gajnis G.F. Makkink kaj A. Pitstra-Rozema. Krome, **pola** tradukkonkurso ankoraŭ ne finiĝis por ĉi tiu jaro. Ĝiajn rezultojn oni atendas en decembro. Se ni mencias ankaŭ la **bulgaran** literaturan konkurson, kiu enhavis aldone tradukajn branĉojn, ni verŝajne ne elĉerpis la liston. Fariĝis klare, ke la siatempa decido malcentrigi la tradukkonkursojn per elimino de tiurilataj branĉoj el la Belartaj Konkursoj montriĝas ĉiam pli ĝusta. Aliaj landaj asocioj povus entrepreni similajn paŝojn sur sia lingva teritorio. Pri tiurilataj iniciatoj bonvolu skribi al la estrarano de UEA pri kulturo (adreso apud la enhavtabelo de ĉi tiu revunumero).



Raymond Schwartz (1894-1973): Lianoma romanpremio estas grava praktika apogo al la originala Esperanto-prozo.

ja bezonas iun eksterordinaran stimulon por ekagigi la povojn al kreaĵ entreprenoj.

Je tiu ĉi evento estas nature rigardi iom pli detale la situacion de tiuj, kiuj ambicias verki seriozan romanon en Esperanto. Ili vivas en certa lingva kaj socia medio, kiu ne rilatas al ilia elekto de esprimilo, nek nutras ilian kreopovon per tiu ilo, nek subtenas ilian kreocelan eltenvolon. Ili aplikas sian arton je minimuma fido pri eldono de la finita verko, kaj plejofte ne havas ajnan esperon pri honorario. Ili sentas sin kvazaŭ sen tradicio. En 1963 W. Auld statistikis nur 37 romanojn aperintajn en Esperanto, el kiuj la plimulto aperis antaŭ 1935. Apenaŭ necesas aldoni, ke ankaŭ la plimulto de tiuj romanoj ne atingas la severan nivelon postulatan por tiu ĝenro en la naciaj lingvoj. Kaj fine, ili devas uzi lingvon, kies stabileco esence dependas de la lojaleco de ĝiaj uzantoj al unu certa dokumento kaj al ties interpreto, kiu okaze eĉ ĉe harditaj esperantistoj povas alpreni formojn psikologie ribelajn. Certasence oni povas priskribi ĉi tiujn flankojn de la situacio de la Esperantaj romanverkistoj kiel plejparte instigomankajn, orfsentigajn. Ili sentas sin portataj direkte al siaj celoj preskaŭ sole de sia dediĉemo al la lingvo mem, do nutrataj ekskluzive el siaj propraj rezervoj; ilia grado de elteno estas rekte proporcia al la grado de ilia lingvorezervo materia kaj psika. Ekster tio niaj verkistoj facile elĉerpiĝas, ĉar socia subteno estas preskaŭ nula.

El tio sekvas nova, esenca demando: Ĉu troveblas rimedoj por kristaligi tiun amorfan, nedifinitan, Esperantistan dissocion, al kiu ni, adeptoj de la Internacia Lingvo, iel apartenas? Ĉu eblas kuntiri la fadenojn pli celemfaze, formi socian konkretan pli konstatablan, pli efikan por nia kultura efektivo? Ĉu ni eble povas nin pli konscie mobilizi ĝuste pere de nia plej supera organizo, Universala Esperanto-Asocio, en pli intimaj ligoj kun niaj eldonistoj de libroj kaj revuoj, kaj kun ĉiaj aliaj kulturagantoj en la Movado, por pli aktive labori sur nia komuna, internacia tereno? Ni povas, se ni volas, se ni konscias; ni povas multobligi niajn internajn klopodojn krei internacian socian bazon, fidindan, aŭtentikan, kapablan porti kaj pluevoluigi kreaĵ valorojn, la solajn valorojn, per kiuj ni povas efike insisti pri nia ekzisto, nia merito. Konkursoj ja ne sufiĉas, aŭ kelktagaj rendevuoj, aŭ sporadaj aŭ periodaj klopodoj de individuoj aŭ malgrandaj grupoj. Ni bezonas lanĉon de kultura fluo pli potenca, kunordigita, sufiĉe vastetenda por inkluzivi ĉiujn, sufiĉe memfida por alteni nian propran plenfidan agnoskon kaj partoprenon. Ni devas plifortigi nian plej superan asocian organizon kaj ĝiajn instituciojn, kaj la landajn membroasociojn kaj fari ilin pli laborkapablaj. Unufaze: Ni bezonas Internan Kulturen Superprogramon, kiu okupu sin ne nur pri unuopaĵoj, sed pri la tuta komplekso de la kulturado de la Internacia Lingvo. Nur tiam, el tia kultura kerno de pliiĝanta intenso, ni povas atendi pli substancajn interligojn kun organizaĵoj neesperantistaj kun socie gravaj celoj, por plifirmigi

BELARTAJ KONKURSOJ 1980
Originala poezio; Unua premio:

MALICE KONTRASTE

(spleno postduoncentjara)

Pompe plenfloris revoj estontaj,
mire instigis baroj alfrontaj,
ĉian ĝemsplenon distris nur kino,
ĝermis amor' ĉe flustroj renkontaj.

Mond' depresia fride severis,
vojon trabati orf' sinoferis,
tage mongajni strebe servutis,
lerni vespere pene toleris.

Taskoj kompaktis premtordante,
mankis liberaj horoj konstante,
ĉiam tenadis cerbon lucidan,

nian propran socian bazon kaj ĝin plivalorigi por la ĉirkaŭmondo.

Ĉu mi disvagiĝis for de mia temo? Mi kredas, ke ne. Jam venis la tempo agnoski tion, ke sen vera, nutra socia bazo kulturaj kresko kaj influo estas grave handikapitaj. Sen tia bazo nia kulturo daŭre pendas en libera aero, restos amatoreca, efemera, ne havas evolukapablojn, krom ĝis certa forma grado. Ekzemple en la kazo de seriozaj romanverkistoj tia manko de socia, simpatia subteno malhelpas ne nur ilian verkemon, sed ankaŭ ilian verkistan evoluon.

Kaj jen denove ni staras antaŭ la fenomeno de nia romana konkurso. Ĝi donis rezultojn, rezultojn kvante kaj kvalite neatenditajn. La sprono efikis. Iuj reagis al la sprono de konkuro, de premio. Ekstera forto pruviĝis grava klopodigo. Mi emas rigardi tion kiel subtenon de mia tezo. Finfine eĉ premio havas socian aspekton. La verkistoj ne plu trovas sin en vakuo. Ili sentas sin portempe stimulataj, iliaj kreaĵ talentoj mobiliziĝas, esprime konkretiĝas por konkreta celo. Evidente la surogata tasko de premioj povas bele servi dum mankas pli efika socia subteno al niaj verkistoj.

Por juĝi la romanajn manuskriptojn por Premio Raymond Schwartz aparta komisiono devis esti starigita. Mi estis tiel mirinde bonŝanca, ke mi preskaŭ tuj trafis je kompetentaj homoj, sufiĉe dediĉemaj preni sur sin la timigan taskon de tralego kaj prijuĝo. Ĉiuj plenumis la juĝlaboron akurate kaj eminente. Iliaj skribaj raportoj ampleksas 40 tajpitajn paĝojn, do tuta libreto en si mem. Mi dubas, ĉu tiaspeca juĝlaboro povas entute esti pli kompetente plenumita. Al ĉiuj tri eminentaj juĝintoj de la romana konkurso, s-ino Emilija

scion paradis ŝance pedante.
En tagoj deksepjaraj.

Knabon spaliris
plenfloraj futursonĝoj,
pase' konspiris.

Destino nin enpuŝis en militan renkonton,
forrabis adoleskon, aŭ vundis invalide,
kaoso postmilita ah feroce korfride
muelis koron generacian en senhonton.

Griznuboj ĉiam kovris senliman horizonton.
Pro manka varo trompoj prosperis por inside
vendaĉi mistifaĵon al laikoj senbride.

Forfadis sonĝoj nepre en duŝan desaponton.

Dum krizojn mizeregajn konkeri ni klopodis,
forflugis tridek jaroj, levante l' vivnivelon.
Stagniĝis altkreskado, olea ŝok' eksplodis,
kirlante mondmerkaton en ĝisfundan ŝancelon.
Tra ŝtormepokoj viro ĉefvivon eluzinta,
fine emeritiĝis for de ŝlim' labirinta.

Orfo sensperta
travivis ŝtormepokojn,
mens' jam dezerta.

Ho, emancipon gajnis ĝismortan!
pelis servuton jam neelportan.
Horoj abundas, paŭzoj laŭplaĉaj,
ĝuas matenan troton komfortan.
Baldaŭ sentaskoj tedas langvore,
ofte memor' perdiĝas vapore,
ardan tralegon rompas dormeto,
lante memfido ŝrumpas korplore.
Trudas artrit' enfali en splenon,
vei krepuskan tristan ĉagrenon.
Junan vigoron se nur regajnus!
Strebos plu dresi kadukan ĝenon.
En tagoj sepdekjaraj.

Reutao

Horoj abundas
pro emancip' ĝismorta,
tamen profundas
mond', iritas ofte min
menso jam senrisorta.

Masayuki Kuroda
(Japanio)

Lapenna el Zagreb (Jugoslavio), s-ro Hugh Martin el Glasgovo, nun loĝanta en Akranes (Islando), kaj al s-ro Nicolino Rossi el Napoli (Italio), mi esprimas profundajn dankojn en la nomo de UEA, de ni ĉiuj.

Kiel mi jam diris, envenis entute 10 manuskriptoj de romanoj konkurse por Premio Raymond Schwartz. Unu verkisto ensendis tri manuskriptojn kaj je unu kunlaboris du aŭtoroj. La verkintoj do estas 9, el 6 landoj. Laŭteme la romanoj montras grandan variecon. Inter ili estas verkoj profunde seriozaj, pritraktante sociajn, filozofiajn kaj psikologiajn problemojn, kaj ankaŭ verkoj leĝeraj, celantaj unuavice distri. Iuj havas karakteron de futura vizio, aliaj de biografio. Atentinde estas, kiom la sombraj koloroj de melankolio, pesimismo, perforto regas la scenojn — sed optimismo, gajo, fido al la vivo kaj estontaj tempoj malmulte certigas sin. Evidente, laŭ tiuj tekstoj, nia epoko ne instigas al uzo de helaj koloroj en serioza literaturo. Aparte interesa estas la lingva nivelo aŭ — ĉu mi diru — la lingva politiko manifestata en iuj el la romanoj. Kun unu aŭ du esceptoj la manuskriptoj estas lingve kaj stile bonaj, eĉ superaj. Tio en si mem ne estas io aparta. Pensiga estas tamen la fakto, ke pli ol unu aŭtoro opinias la nunan staton de la lingva evoluo ne kontentiga por ebligo de serioza literatura esprimado en prozo. Tiuj aŭtoroj deiras de la baza aksiomo, ke la relativa subevoluinteco de la originala Esperanta romano havas sian kaŭzon ĉefe en manko de adekvataj esprimoj por romanverkado. Se fakte tiel estas, ni bezonas seriozajn objektivajn esplorojn kaj analizon de la problemo, pli ol subjektivajn eksperimentojn kaj provojn sur publika tereno. Mi tamen volas ĉi-kaze memorigi pri sukcesaj tradukoj en Esperanton de bo-

naj romanoj, kiuj miaopinie pravas, ke ne nepre estas la lingvo mem, kiu estas kulpiginda, se al ni mankas taŭgaj romanoj, sed prefere io alia, ekzemple manko de kreaj talentoj kaj sociaj stimulaj fortoj. Prilingva diskutado ĉi-rilate tamen verŝajne postulos sian lokon sur alia tereno — mi ne vidas kaŭzon pli detale trakti tiun temon je tiu ĉi okazo.

La verko meritinta la frontan lokon, laŭ sumo de la viclokigaj poentoj de la tri juĝintoj, estas romano titolita *Kiuj semas plorante*, kiun kunaŭtoras **Éva Tófalvi**, Hungario, kaj **Oldřich Kníchal**, Ĉeĥoslovakio. Laŭ la juĝkomentoj la premiita verko estas psikologia, intima romano, kvazaŭ taglibro de la protagonisto, kiu rakontas pri siaj viveventoj kaj siaj psikaj sintenoj kaj reagoj al la vivo. La aŭtoroj montras, kiel homo povas erarvagi sub influo de politika ideologio — ĉi-kaze naziismo — ĝis perfido al siaj kunhomoj kaj eĉ intimuloj. La stilo estas modera, sen superflujaj precizigoj. La konstruo estas kohera, ne dispeciĝas en ĉapitrojn. Personecaj karakterizoj estas sukcesaj, sociaj kaj politikaj eventoj klariĝas el cele efikantaj dialogoj kaj sobraj evidentigoj. Tiaj estas nur kelkaj el la juĝkomentoj pri tiu verko, kiu gajnis la Premion Raymond Schwartz en konkurso, kiu entute estas bela pruvo pri la latentaj povoj de la Esperanta literatura kulturo.

Certe la romana konkurso kronas niajn ĉi-jarajn konkursojn, ĝi donis la plej substantajn rezultojn, kaj plej senteble ellatentigis novajn kulturkreaĵajn fortojn. Nun la vico venas al la eldonistoj konduki tiun eksperimenton al la logika fino de publikigo. Ni esperu, ke ili interesiĝos kaj sukcesos en tio.

Baldur Ragnarsson

Ŝekspiro de J. Francis

Recenzas Mauro Nervi (Italio):

Rikardo tria (1592?), Vilhelmo Ŝekspiro (1564-1616). El la angla tr. John Francis. Glasgow: Kardo, 1980. 177p. (nenumeritaj). 21cm. ISBN 0 905149 10 4.

En la *Poetiko* de Aristotelo oni trovas la principon, ke dramverkisto neniam tronigri la animon de punota fripono, ĉar, se eĉ ekbrileton de lumo oni ne trovas en li, la spektantoj rifuzos identiĝi kun li, kaj la dezirata "kathajresis" (puriĝo) ne okazos. En tiu ĉi junaĝa dramo, Shakespeare ŝajnas neglekti ĝuste tiun bazan regulon de la teatra proceduro; li eble neniam kreis tiel malhelan, senhezite kruelan personon. Rikardo kuspas la konvenciojn de sia epoko kaj per sia mal-moralo kaj per sia fizika malbelo; sed ĉi-lastas aperas finfine kiel la evidentigo aŭ konkretigo de tiu **spirita** perverseco. Li brutale prisarkasmas la petolajn amuzojn de la nobelaj kortegoj:

*...sulka milit' glatigis sian frunton,
kaj nun, anstataŭ rajdi hirtajn bestojn
por sturmaflukti timajn malamikojn,
li piruete venkas buduaron
laŭ lule plaĉa logo de liuto.*

Kaj iom pli poste, en la sama komenca monologo, Rikardo mem ironias pri sia sorto per jenaj teruraj vortoj:

*Min, kies kriplo mokas simetrion,
natur' perfida trompis je la trajtoj...
nu, mi dum ĉi pepanta pacotempo
neniun ĝojon havas por min distri
krom studi mian ombron en la suno,
kaj prikomenti mian misformecon.
Kaj sekve, ne povante amindumi
por distri min dum ĉi ĝentilaj tagoj,
mi jam decidis roli friponegon
kaj spiti tiujn ĉi frivolajn tagojn.*

Mi konfesas, ke mi ĉiam sentas skuiĝon ĉe relego de tiuj ĉi versoj, per kiuj Rikardo pravas sin spirite parenca al la mozarta Donjuano unuflanke, pro la memvola akcepto de kontraŭetika konduto; al la leopardia Sappho aliflanke, pro la ŝira malkonkordo inter la harmonia mondo kaj la propra, malharmonia korpo. Kaj la psika monstreco de Rikardo manifestiĝas per mensogo, fivoluta, hipokriteco; sed, ĉefe, per sango. La vorto "sango" obskure eĝiĝas de unu punkto al la alia de la dramo per absolute ne normala ofteco, kune kun la plej fantaziriĉaj malbenoj: tiel estas en la simfonia sceno, en kiu Margareta per elstara elokvento insultas kaj malbenas Rikardon, sporade interrompita de Rikardo mem kaj de aliaj rolantoj. En tiu ĉi punkto, ankaŭ la traduko de Francis brile raketas per serio da trafikaj ekvivalentoj:

*... Gnoma, aborta, grundsnufanta porko,
kiu naskote jam markiĝis, kiel
sklav' de natur' kaj filo de infero,
utera feĉ' de la patrino peza,
naŭza elkraĉo de l' ingveno patra...*

Oni rimarkas, ke Margareta neniel diferencigas inter spirita kaj korpa misformeco; Rikardo vivas sur la scenejo kiel homogena koagulaĵo de ĉiuj negativaj ecoj, aŭ pli ĝuste de la ecoj, kiuj kontraŭas kaj revolucias la normalan, ne patologian etikon.

La interpreto de Francis alpintiĝas en la klimaksaj momentoj de la dramo: en la supre cititaj, ekzemple, aŭ en rakontado de la sonĝo de Clarence, tiu longa "interna" majstroverko. En aliaj punktoj mi tamen perceptis ian laciĝon de la traduka strebo, ian neflu-econ de la versa ritmo; tiam mi ricevis la impreson, ke pro amo al fideleco la kvaropano kelkgrade stumpigis la ŝekspiran elokventon kaj trodensigis la Esperantajn versojn, tiel kreante spirmankan mekanismon. La ombro de Kalocsay ankoraŭ vagas en niaj vicoj, sed restas plu neatingebla en siaj altoj.

Tiun ĉi tipografie plaĉan volumon enkondukas longa historia superrigardo, plej kompleta kaj necesa, kvankam malfacile legebla.

Mendu ĉe UEA: 19,50 (por Nederlando 20,28) gld., plus sendokostoj 10%.

Kuroda estas ribelulo

Recenzas Peter Rados (Hungario):

Lazur' kristala kaj pluv' susura; Utaaro, de Masayuki Kuroda (1909-). Oosaka (ne indikita), 1978. 117p. 19cm.

Masayuki Kuroda estas soft-voĉa, sed principa ribelulo. Li ne povas paciĝi pri la monstroj de la nuntempa mondo: pri la taga rutino, pri la medi-poluciado, pri la monavideco, pri la militemo. Li sopiras humanismon:

*Translima svarmo
perdigas humanecon.
Febblas alarmo!
Obsedas nin danĝero
de l' trafika infero.*

("Kompakta ĉagreno en torentaj horoj")

Sed kiel li serĉas la eliron? Li nostalgias pri la antikva feŭdeca japana socio: *Mi dronus lante/en foran feŭd-epokon/ ... /forgeŝus nunan nunon.* ("Antaŭ la muzeo") aŭ eĉ, kiel evidentiĝas el la poemo "En arkeologia domo", li volas translokiĝi pli malproksimen en la tempo, al la praepoko de la homaro, kiam *Inspiro fulmis en funkcio pracerba*. La alia fuĝ-provo de la utisto estas la erotiko. Li majstre, per diafanaj strioj kapablas komprenigi la ĝisostan eksopiron, ekzemple:

*Fraŭlin' karmina
kun mi tro kunkroĉiĝis
per prem' tordema,
amare ŝi parfumis,
pudore min okulumis.*

(*"Kompakta ĉagreno en torentaj horoj"*)

Fine, Masayuki Kuroda serĉas humanismon kaj eble eĉ trovas ĝin en la internacilingva medio, kie regas la etoso de la reciproka helpo, tiu de la nacia, rasa, seksa egalecoj. Tial por li la eventoj de la Esperanto-movado estas tiom memorindaj, kiel ekzemple en "Internacia amasa disiĝo" pri Oomoto-festivalo.

Konklude, en *Lazur' kristala kaj pluv' susura* la leganto konas veran esperantistan poeton, portantan al nia originala literaturo aromojn de sia nacia poezio. Li, kiel Kalocsay versis pri Baghy "homecon serĉas mal-espere", same kiel ni ĉiuj. Pro tio mi pardonas al li la japanecajn miksadojn de **r** kaj **l** (blemso anst. bremso, Varpurga anst. Valpurga ktp.) kaj la renovigitan vortkunmetadon, kondamniton kiel malbonstila de Kalocsay, ekz. fajnhauĉto, flavombrelo, valorsekundo, delirfloro ktp. Sed aliflanke, la leganto estas dankema al la japana poeto por la majstraj tradukoj de klasikaj utaoj troveblaj en la fino de la volumo.

Mendu ĉe UEA: 11,40 (por Nederlando 11,85) gld., plus sendokostoj 10%.

Altnivele pri heroeco

Recenzas W. Krikke (Nederlando):

Riporto skribita en la pendumila maŝo (1945), de Julius Fučík (1903-1943). El la ĉeĥa trad. R. Hromada k.a. Prago: Panorama, 1979. 110p. Ilus. 19cm.

Fučík, fervora komunisto kaj kapabla ĵurnalisto, fariĝis ĉeĥa nacia heroo pro sia rolo en la rezisto-movado kaj pro sia admirinda kuraĝo dum la nazioj torturis lin. Estas malfacile kompreneble, ke homo povas suferi ĝismorte, kaj tamen resti spirite nerompita, perfidante eĉ ne unu vorton. Li kapablis sekrete eĉ surpaperigi siajn pensojn pri ĉio, kio okazis ĉirkaŭ li, kun elstara talento de psikologia observado. Multaj tekstopartoj estas profunde kortuŝaj, kaj ne estas mirige, ke ĉi tiu libro jam estas tradukita en pli ol sepdek lingvojn. La Esperanta traduko estas bonstila, la papero kaj preso bonkvalitaj. Ĝi estas unu el la plej altnivelaj libroj pri tiu plej terura periodo en la historio de la homaro.

Mendu ĉe UEA: 11,70 (por Nederlando 12,17) gld., plus sendokostoj 10%.

Parolas miaj kuzoj

Recenzas Renato Corsetti (Italio):

Matenruĝo; La juneco en la tridekaj jaroj, de Kazuta Oka. Kioto: L' Omnibuso, 1976. 191p. Ilus. de la aŭtoro. 19cm.

Ĉi tiu libro estas leginda pro minimume du kialoj. Ni ekzameniu ilin aparte:

La enhavo. Al ne japanaj kaj al junaj esperantistoj ĝi konigas la etoson regantan en la tridekaj jaroj inter progresemaĵoj kaj aparte inter esperantistaj progresemaĵoj. Tiu parto de la historio de la Movado (eble unu el la pintoj de ĝia idealismo) estas apenaŭ konata. Oni povas nur bedaŭri, ke esperantistoj kiel, ekzemple, Verda Majo estas multe malpli konataj kaj influaj al la meza esperantisto ol, ekzemple, amaso da verkantoj de poemoj pri la propra animstato dum aŭtuno. Legante ĉi tiun libron, oni ricevas interesan instruon pri la maniero laŭ kiu oni varbis homojn al Esperanto-kursoj kaj pri la kialoj de la granda intereso pri ili en tiuj malfacilaj jaroj.

La lingvo. Kiam oni legas japanajojn, oni havas impreson kvazaŭ oni aŭskultus la lingvon de siaj kamparaj kuzoj. Tio validas, kompreneble, por eŭropaj esperantistoj, por homoj, kiuj sentas sin ĉe la "centro" de la Movado. Tamen, en tiu lingvouzo estas tiom da freŝeco, tiom da admirinda malŝabloneco. Malofte oni renkontas kliŝajn esprimojn. Tiu japaneca aroma flarblas tra la tuta libro, kaj mi rekomendas al multaj internacilingvaj "literaturistoj" flari ĝin. Ili malkovros, kiom unudimensia estas la lingvo uzata en ĉi tiu revuo, en la paroladoj de kelkaj prezidantoj de universalaĵoj kaj en la rekomendoj de la Akademio. Tiu freŝa lingvo estas varo malofte vendata en eŭropaj literaturaj foiroj.

Mendu ĉe UEA: 22,50 (por Nederlando 23,40) gld., plus sendokostoj 10%.

Karno anstataŭ ŝtono

Recenzas Boris Kolker (Soveta Unio):

Du intervjuoj; Interparoloj kun Kálmán Kalocsay kaj William Auld, de Reinhard Haupenthal. Saarbrücken: Artur E. Iltis, 1979. 28p. Ilus. 21cm.

Dum multaj jaroj mi kutimis uzi la moskvan metropolitenon. Mi konsentis la ĝeneralan opinion pri majesto kaj belo de ĝiaj subteraj palacoj-stacioj, kiujn oni preterkuras hastante. Sed foje mi montris ĝin al grupo da italaj turistoj. Je mia miro, ili trovis amason da art-detaloj, kiujn mi ne estis rimarkanta antaŭe.

Simila sento min akompanis dum legado de tiu ĉi libreto. Du kolonoj de nia literaturo respondas demandojn dum enhejma konversacio. Ili ne havas tempon por pripensi siajn vortojn, nek por postredakti ilin. Kaj rezulte ni vidas la homojn "en karno", sed ne ŝtoniĝintajn monumentojn. Estas pli ol interese konatiĝi kun iliaj konceptoj kaj opinioj, kiuj estas tre siaspecaj kaj, eble, eĉ iom herezaj, kun ŝatoj kaj malŝatoj, kun mistifikoj pri Peter Peneter kaj Georgo Maura.

La libreto montras novajn facetojn de tiuj du admirindaj homoj kaj de la Esperanta kulturo ĝenerale. Mi varme rekomendas ĝin al ĉiuj, por kiuj la Internacia Lingvo estas pli ol eta efemera hobiaĵo.

Mendu ĉe UEA: 6,00 (por Nederlando 6,24) gld., plus sendokostoj 10%.

Ainaj jukaroj (1922). Kompilis Jukie Ĉiri (1901-1922). El la aina tr. Acuŝi Hoŝida k.a. Sapporo: Hokkajda Esperanto-Ligo, 1979. 94p. Ilus. 22cm. Eposoj de la aina popolo, minoritata gento en norda Japanio. Kun klarigaj artikoloj pri ainoj. Prezo: 8,10 gld.

Analizo de la interrilatoj inter la blindularo kaj la diversaj socioj de la eŭropaj industriigitaj landoj, José Starck. Brusela Libera Universitato, 1980. 204p. 21cm. Ringe broŝurita. Licenciĝa disertaĵo. Prezo: 30,00 gld.

Apliko de Esperanto en scienco kaj teĥniko 1980. Red. Zdeněk Pluhař. Praha: Ĉeĥa Esperanto-Asocio, 1980. 104p. Multobligita. 29cm. Po dek referaĵoj pri "La vivmedio hodiaŭ kaj morgaŭ" kaj "Problemoj de la faka lingvo kaj traduko". Prezo: 18,00 gld.

Catalog of the George Alan Connor Esperanto Collection. Kompilis Karin Smith kaj Susan Haake. Eugene: University of Oregon Library, 1978. 121p. 28cm. Katalogo de la plej ampleksa Esperanto-kolekto en publika biblioteko en Nord-Ameriko. Prezo: 14,70 gld.

Ĉu vi parolas tendare? (1974), Renato Corsetti kaj Mauro La Torre (1949-). Roterdamo/Sarajevo: TEJO/Esperanto-Ligo de Bosnio kaj Hercegovino, 1980 (3a eld., fotoreprese). 64+27p. Ilus. 20cm. Grandparte perbilda kurso por labortendaroj. Prezo: 5,10 gld.

Doktoro Bovero, A. Lopez Luna. Buenos Aires: Amigos de Lopez Luna, 1980. 102p. Multobligita. 17cm. Satiro pri la banalo kaj malsaĝo de politikistoj. Prezo: 3,00 gld.

Enciklopedio de Esperanto (1933). Red. L. Kókény (1897-), V. Bleier (1903-1940), K. Kalocsay (1891-1976). Budapest: Hungara Esperanto-Asocio, 1979 (fotorepreso). 604p. 23cm. Bindita. ISBN 963 571 051 8. La plej riĉa movada konsultlibro produktita antaŭ *Esperanto en perspektivo*. Prezo: 45,00 gld.

Enkonduko al literatura kritiko, Giorgio Silfer (1949-). Kuopio/Lieĝo: Someraj Universitataj Kursoj/Librofako de Literatura Foiro, 1978. 44p. 30cm. SUK-Kursoteksto KT 30. Priskribas la ĝeneralan okcidentan tradicion kaj la literaturan kritikon tra la historio de Esperanto. Prezo: 18,60 gld.

Enkonduko en la bazajn principojn de la psikodiagnozo miokinetika de d-ro Emílio Mira y López, Gilson Villas Bôas Passos. Associação Capixaba de Esperanto, 1978. 12+41p. Mimeo. 22cm. Sistemo por analizi la psikon pere de la korpaj sinteno kaj moviĝo. Prezo: 0,90 gld.

Esperanto-fakta. Malmö: Förlagsföreningen Esperanto, 1980. 39p. Ilus. 19cm. Faceto 1. ISBN 91 85288 03 9. Bela informbroŝuro, bazita sur la CED-dokumento *Bazaj faktoj*. Prezo: 2,10 gld.

Esperanto in perspectief (1974), unua parto, Ivo Lapenna (1909-) k.a. El Esperanto tr. Marc Vanden Bempt. Leuven: Esperanto 2000, 1980. 50p. 21cm. La unuaj du ĉapitroj de *Esperanto en perspektivo*: "La lingva problemo en internaciaj rilatoj" kaj "La Internacia Lingvo (Esperanto)", en nederlanda traduko. Prezo: 5,70 gld.

Esprimo de sentoj en Esperanto (1930), Edmond Privat (1889-1962). Den Haag: Internacia Esperanto-Instituto, 1980 (4a eld., fotoreprese). 61p. 17cm. Klasika studo pri la elekto de vortoj, afiksoj kaj vortordo cele al trafa transdono de emocioj. Prezo: 7,20 gld.

Evangelio laŭ Petro kaj La morto de Jesuo kaj kio poste?, La, Gerrit Berveling (1944-). Vlaardingen, 1980. 20p. Mimeo. 21cm. Voĉoj Kristanaj 1. Traduko el la helena de apokrifajo malkovrita en 1886, kaj originala eseo. Prezo: 1,50 gld.

Histoire de la langue universelle (1903), Louis Couturat (1868-1914) kaj Léopold Leau (1868-1943). Hildesheim/New York: Georg Olms Verlag, 1979 (fotorepreso). 31+576+8+112+8p. + faldita tabelo. 19cm. Bindita. Inkluzivas *Les nouvelles langues internationales* (1907) de la samaj aŭtoroj kaj bibliografian apendicon de R. Haupenthal. Verŝajne la plej ampleksa verko ĝis nun aperinta pri la historio de planlingvoj antaŭ Ido. Prezo: 126,00 gld.

Historio de Esperanto, Karl Beckmann. Wien: Aŭstria Esperanto-Instituto, s.j. (1980). 11p. 21cm. Skiza resumo, iom simpliga. Prezo: 1,50 gld.

Joĉjo, la amiketo, Elsa Otto. Den Haag: Internacia Esperanto-Instituto, 1980. 94p. Ilus. 17cm. Rakonto pri knabo, kiu lernas Esperanton. Prezo: 8,10 gld.

Klopodis organizi, sed vane! Iam kompletigota plena verkaro de L.L. Zamenhof, kajero 7. Kioto: Eldonejo Ludovikito, 1980. 446p. 22cm. Bindita. Verkoj el la jaroj 1905-1906, kiam malsukcesis provo lanĉi Tutmondan Ligon Esperantistan, inaŭguriĝis la Universalaj Kongresoj de Esperanto, kaj miksan akcepton trovis la projekto "Homaranismo". Prezo: 39,00 gld.

Kontrastoj, Carmel Mallia (1929-). Zabbar: La aŭtoro, 1980. 47p. 19cm. ISBN 0 902756 12 5. Tre variaj poemoj. Enkonduko de Marjorie Boulton. Prezo: 6,60 gld.

Levski: Apostolo de libereco; Portreto de Vasil Levski sur la fono de Bulgario de la 19a jarcento (1967), Mercia MacDermott. El la angla tr. Nikola Aleksiev. Sofia Pres, 1980. 359p. Ilus. 21cm. Bindita. Pri elstara revoluciulo (1837-1873) martiriĝinta en la lukto kontraŭturka. Prezo: 17,40 gld.

Longnazulo, La, Wilhelm Hauff (1802-1827). El la germana tr. Reinhard Haupenthal. Saabrücken: Artur E. Iltis, 1980. 36p. Ilus. 21cm. Fabelo pri perdita filo de ŝuisto, kaj pri longnaza nano, kiu lin retrovas. Prezo: 9,00 gld.

Niaj fabeloj, Lydia Melodia. El la itala tr. Mauro Nervi (1959-). Livorno: Eirene Editore, 1980. 27p. Ilus. de Eva di Barbora. 17cm. "La rapidtrajno 114" kaj "La koboldoj de la aŭtovojo". Prezo: 4,50 gld.

Por kaj kontraŭ reformoj! Iam kompletigota plena verkaro de L.L. Zamenhof, kajero 8. Kioto: Eldonejo Ludovikito, 1980. 383p. 22cm. Bindita. Verkoj el la jaroj 1907-1908, kiam eksplodis la Ido-krizo. Prezo: 39,00 gld.

Skizo de ŝuahila metriko, Nino Vessela (1947-). Bellinzona: Hans Dubois, 1980. 65p. 21cm. Fotokopie. Kun lertaj tradukoj de multaj ekzemplaj versaĵoj. Prezo: 14,40 gld.

Studoj pri la Esperanta literaturo, Vilmos Benczik (1945-). Takasago: La Kritikanto, 1980. 143p. 21cm. Dek kvar eseoj, ĉefe pri specifaj verkistoj: Vallienne, Baghy, Auld, Szathmári, Sadler k.a. Prezo: 19,50 gld.

Diversaĵoj:

Dosierujo plasta, por leteroj kaj dokumentoj. Formato: A4. Hel-verda travidebla plasto, kun verde surprisita vorto "Esperanto". Eldono okaze de la 65a UK en Stokholmo. Prezo por dek dosierujoj (minimuma mendokvanto): 12,00 gld.

Esperanto; Estas la dua. Kantas Max Roy Carrouges kaj Tany Turens. Paris: ECAP International (kunlaboris SAT-Amikaro), s.j. (1980). 45 t/m. 18cm. Duflanka, stereofona. E7023. Du kantoj. Prezo: 10,50 gld.

Karnavalo en Rio. Kantas Joel de Castro. Rio de Janeiro: Sono-Viso, s.j. (1980). 33 t/m. 18cm. Duflanka, stereofona. SC 003 - SV 078. Kvar kanzonoj verkitaj de Sylla Chaves. Prezo: 7,20 gld.

Krajona duopo. Bonkvalitaj globa kaj grafita krajonoj el metalo kaj nigra plasto, kun verde surprisita vorto "Esperanto". Pakitaj en travidebla donacoskatolo. Eldono okaze de la 65a UK en Stokholmo. Prezo: 12,00 gld.

Nouveau cours rationnel et complet d'Espéranto, SAT-Amikaro. Kun la voĉoj de Perla Martinelli kaj Olivier Tzaut. Kaseto. 90 min. Paris: SAT-Amikaro, s.j. (1980). Suplemento al la samtitola lernolibro. Prezo: 17,10 gld.

Per nia nura vol'. Kantas Suzana. Romo: Parola Kulturo, 1980. Kaseto stereofona, 30-minuta. Dek feminismaj kantoj, tradukitaj de Renato Korseti. Kun tekstaro. Prezo: 18,00 gld.

Sako plasta por butikumado. 36x45cm. Blanka, kun verda stelo kaj la vorto "Esperanto". Eldono okaze de la 65a UK en Stokholmo. Prezo por dek sakoj (minimuma mendokvanto): 6,00 gld.

Silka portreto de Zamenhof. Tre bela foto de la aŭtoro de Esperanto, delikate teksita per nigra kaj blanka silko. Kun subskribo de d-ro Zamenhof. Borderita. Formato: 28x42cm. Eldono: Ĉina Esperanto-Ligo, 1980. Prezo: 9,00 gld.


LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando, ne akceptas mendojn, kiuj ne atingas **la minimuman mendosumon de 15,- guldenoj**. Al la netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 4% kaj al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 18% por la enlanda imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por la sendokostoj. Tamen, la sumo de la sendokostoj estas **minimume 3,- gld.**

Ĉi tiun rubrikon redaktas: IAN JACKSON, 6A Eastcombe Road, Weston-super-Mare, Britio BS23 2TQ

37a INTERNACIA JUNULARA KONGRESO:

Vojoj al Meksikio

MEKSIKIO lastatempe spertis malgrandan tertremon. Tamen, tio ne estas la kaŭzo pro kiu al ni mankas pli da definitivaj informoj pri la venontjara TEJO-kongreso en tiu lando. Ĉiukaze, ne timu, ĉar ne tremis Oaxtepec (prononcu: oastepek), en kiu okazos la Kongreso, nek Meksiko, kie loĝas la organizantoj. Simple, la poŝto ial misfunkcias inter la meksikaj aktiviloj kaj la Estraro de TEJO. Sed, kio estas ĝis nun pli malpli klara? La 37a IJK plej verŝajne definitivigos siajn datojn tiel, ke inter ĝia fermo kaj la komenciĝo de la 66a UK en Brazilo restu plena libera semajno, por la homoj, kiuj klopodos partopreni ambaŭ aranĝojn. Tio signifas, ke la 37a IJK devus okazi inter la 11a kaj 18a de julio 1981. La aliĝilo por la Kongreso ankoraŭ ne pretas, sed ĝi aperos baldaŭ kaj enestis la plej proksiman numeron de *Kontakto*, revuo de TEJO. Kvankam oni ankoraŭ marĉandas pri la kongreskotizoj, ŝajnas, ke ili estos ie inter 200 kaj 250 guldenoj, se oni estas, ekzemple, 20-jara kaj pagas sian aliĝon en la unua periodo. Kiel kutime, la aliĝkotizoj inkluzivas



Oaxtepec (sur la mapo) ne estas urbo aŭ vilaĝo. Ni volas diri, ke ĝi ne havas konstantajn loĝantojn. Ĝi estas feria urbeto, kiu ŝanĝas sian "loĝantaron" ĉiun duan semajnon aŭ almenaŭ unufoje monate. La tuta areo de unu miliono da kvadrataj metroj konsistas nur el parkoj, naĝejoj, hoteloj, kunvenejoj, ludejoj ktp. Oaxtepec povas gastigi ĉ. du mil homojn samtempe. Kiel oni povas vidi sur la mapo, la loko havas siajn proprajn vojojn, valojn kaj montojn, riverojn, pontojn, arbarojn, fontojn. . .

ankaŭ la restadon kaj la manĝojn dum la kongresa semajno. Komparante la kotizon de la meksika IJK kun la aliĝprezo de la antaŭaj TEJO-kongresoj, oni ne forgesu, ke IJK ĝis nun verŝajne neniam okazis en tiel bela kaj komforta loko, kun tute idealaj loĝ- kaj labor-kondiĉoj.

Kiel pri Brazilo, stariĝas la demando de la vojaĝo al la 37a IJK. Se oni havas longajn feriojn, kaj la plimulto de la gejunuloj ja havas ilin, el Eŭropo eblas malmultekoste flugi al Usono (revenbileto akireblas por proksimume 700 guldenoj). El Nov-Jorko oni povas aŭtobusi al Meksikio. Tio jes postulas tempon kaj iom da streĉo, sed ĝi ankaŭ ŝparas amason da mono. Por tiuj, kiuj havas malpli da tempo kaj pli da mono, UEA kaj TEJO traktas flugan karavanon el Eŭropo. Laŭ la nuna stato de la aferoj, fluga revenbileto kostos ĉ. 1800 guldenojn. Al tiu temo ni ankoraŭ revenos en ĉi tiu rubriko.

Orienta „Koncize”?

NE MALOFTAS asertoj pri la vigleco de la junulara Esperanto-movado en Japanio kaj Korea Respubliko. Tamen, samtempe kun tiuj asertoj aŭdiĝas ankaŭ plendoj, ke al tiuj du grupoj da movadaj aktivuloj mankas la grava dimensio de la internacieco. Ĝin kaŭzas unuavice la geografia malproksimeco de la du landoj, ilia foreco de la aliaj mondpartoj kun vigla Movado. Aliflanke, al la nuna situacio kontribuas ankaŭ la fakto, ke nek TEJO nek la junularaj Esperanto-grupoj en Japanio kaj Korea Respubliko provis ĝis nun sisteme studi la problemon kaj kune serĉi ĝian solvon. Nun ŝajnas, ke io esenca okazos sur tiu kampo.

Dum antaŭ nelonga vizito de Amri Wandel al tiuj du landoj, naskiĝis aparta plano por plibonigi la situacion. Wandel, kiu estas vicprezidanto kaj estrarano pri regiona agado kaj landaj sekcioj de TEJO, proponas, ke la komuna periodaĵo de TEJO kaj kelkaj eŭropaj landaj sekcioj – *Koncize* – regule aperigu rubrikon, kiu nomiĝos "Orienta paĝo". Ĝi enhavu freŝajn informojn pri la junulara Esperanto-movado en Japanio, Korea Respubliko kaj eventuale, poste, ankaŭ en aliaj aziaj landoj. Siaflanke TEJO provizos similajn informojn pri sia propra aktiveco kaj tiu de la landaj sekcioj al la junularaj grupoj en la du aziaj landoj. Tiu reciproka informado celas ne nur pli bonan konatiĝon ambaŭflanke sed ankaŭ la starigon de regulaj skribaj kontaktoj, kiuj siavice devus konduki al intensiĝo de personaj kontaktoj kaj interŝanĝo de vizitoj.

Alia demando, kiun tuŝas la propono de Wandel, rilatas la neekziston de la landaj sekcioj de TEJO en Japanio kaj Korea Respubliko, malgraŭ la fakto, ke en tiuj du landoj aktivas pluraj sufiĉe grandaj junularaj Esperanto-grupoj. Wandel kredas, ke la intensigo de la reciproka informado inter TEJO kaj la du landoj povus konduki al la starigo de kunordigaj tutlandaj forumoj, kiuj ne atencos la memstarecon de la ekzistantaj grupoj, sed helpas al ili venki la problemon de la izoliteco.



Kongresa Komuniko

**66a UNIVERSALA KONGRESO
DE ESPERANTO, Brazilio (Brazilo)
1981 07 25 – 08 01**

**Konstanta adreso: Nieuwe Binnenweg 176,
3015 BJ Rotterdam, Nederlando**

**Adreso de LKK: Caixa Postal 04-0406,
BR-70000 Brasília (DF), Brazilo**

Protektas la prezidento. Kiel Alta Protektanto de la 66a UK konsentis roli la prezidento de Brazilo, João Baptista de Oliveira Figueiredo.

Senatano prezidas en LKK. La prezidanto de la Loka Kongresa Komitato estas vicestro de la reganta partio en la brazila Senato, kaj, sekve, tre grava persono en la politika vivo de la lando. Temas pri senatano José Lins de Albuquerque, multjara esperantisto — kiel estas ankaŭ lia edzino, Maria Nise Studart Lins Albuquerque, kiu laboras en LKK pri artaj aranĝoj. Vicprezidanto de LKK estas inĝ. Enivaldo Alves Silva; sekretario, Nelson Pereira de Souza; protokolistino, Neia Lucia Souza; kasisto, Carlos Augusto Siqueira da Cunha. Respondeas pri eksterlanda informado la konata Esperanta poeto (*Vojo kaj vorto*, 1972) Roberto Passos Nogueira; pri enlanda informado, Darcy Pedroso Machado Gaia; pri loĝigo, Francisco Mattos de Oliveira; pri ekskursoj, Josias Ferreira Barbosa; pri junularaj aranĝoj, Neima Cardoso Adôrno; pri giĉetoj, Mauro Gomes Azevedo kaj José Carlos Gonçalves Vieira; kaj pri la 19a Internacia Infana Kongreseto, Maria do Socorro Sampaio Nogueira.

Kongresejo bela kaj moderna. Laŭ la bela brazila kutimo, la Departamento de Turismo de la Federala Distrikto senpage disponigas al la Kongreso sian ampleksan kongrescentron, Centro de Convenções de Brasília. Temas pri tute moderna domo, kiu malfermiĝis nur fine de 1978, kaj kiu estas inter la plej bone ekipitaj el niaj kongresejoj de la lastaj jaroj.

Internacia Kongresa Universitato alvokas. En la kadro de la 66a UK okazos la 34a sesio de IKU (antaŭe ISU). Universitataj profesoroj kaj simile kvalifikitaj personoj povas proponi prelegon al la Komisiono pri IKU, ĉe prof. Bruce Sherwood, 252 Eng. Res. Lab., University of Illinois, Urbana IL 61801, Usono. La proponoj (originalo plus tri kopioj), kun titolo, resumo, biografieto, fotoportreto kaj reprezenta persona bibliografio, alvenu antaŭ la 10a de januaro 1981. Oni aparte invitas proponojn de junaj universitataj instruistoj kaj profesoroj, kiuj ankoraŭ ne prelegis en ISU, kaj proponojn, kiuj rilatas al la kongresa temo: "Kulturoj kaj lingvoj: pontoj kaj baroj".

Belartaj Konkursoj 1981. La branĉoj de la ĉefa literatura (kaj fotografia) konkurso de la Esperanto-movado

estos en 1981 poezio, prozo (novelo — maksimuma longo 200 x 65 literspacoj), teatraĵo (maksimuma ludodaŭro 25 minutoj), eseo (Premio Luigi Minnaja, proks. 400 x 65 literspacoj, pri temo lingva, literatura, historia aŭ sociologia, prefere en ligo kun la Internacia Lingvo aŭ ĝia uzado) kaj fotografio (minimuma formato 13 x 18 cm.). Oni rajtas konkursi per ne pli ol tri verkoj en ĉiu el la branĉoj, escepte de la branĉo fotografio, kie ne ekzistas limo. Ĉiuj verkoj escepte de fotografaĵoj devas atingi ĝis la 31a de marto 1981, en kvar ekzempleroj, la adreson de la sekretario de BK: s-ro Alec Venture, 22a Grosvenor Road, Wallington, Surrey, Britio SM6 0EF. Fotografaĵoj devas atingi la adreson de LKK ĝis la 1-a de julio 1981, kun la indiko "Foto-konkurso" sur la koverto. Ĉiujn konkursaĵojn oni signu per pseŭdonimo, kiun oni metu ankaŭ sur slipon en fermita koverto kune kun la veraj nomo kaj adreso; sur la koverto mem aperu la pseŭdonimo kaj la branĉo(j) prenita(j). Se eble laŭ la sialandaj poŝt-reguloj, ĉiu konkursanto devas aldoni po kvin ĝuste stampitajn internaciajn respondkuponojn por ĉiu prenita branĉo. Detala regularo de Belartaj Konkursoj estas havebla ĉe la konstanta adreso.

Artistoj anonciĝu! En nia Movado ekzistas multaj bonaj kantistoj, teatraj trupoj, muzikistoj kaj aliaj artistoj, el kiuj ne ĉiuj estas konataj al la centraj movadaj organoj. Se vi havas prezentindajn talentojn kaj ambicias ilin montri sur la plej grava movada scenejo — tiu de la UK — bonvolu skribi al la konstanta adreso.

Aliĝilo, Unua Bulteno kaj baldaŭ afiŝo. Aliĝilo kaj Unua Bulteno por la 66a UK iris al ĉiuj abonantoj de *Esperanto* kun la septembra numero; pliaj stokoj estas mendeblaj ĉe la kongresa adreso. Aperos post nelonge esperantlingva afiŝo pri la kongreslando, kiu estos havebla ĉe multaj perantoj kaj landaj asocioj de UEA. La Unuan Bultenon kaj afiŝon la Kongreso havas senpage de la brazila turisma instanco Embratur.

Filmo pri Brazilo. Por informoj pri esperantlingva filmo pri la kongreslando, kiu jam nun cirkulas, skribu al LKK.

Kotizu nun kaj ŝparu! Post la fino de 1980, kotizoj altiĝos je 10 ĝis 14 procentoj, do estas konsilinde aliĝi baldaŭ. Aparta kotizotabelo validas por latinamerikanoj, t.e. loĝantoj de Suda kaj Centra Ameriko, antilaj landoj kaj Meksikio. Aliĝilo kun tiu tabelo estas havebla ĉe LKK.

Jam preskaŭ sepcent! Pro la escepte frua varbado de aliĝoj por la 66a UK, la nombro de aliĝintoj estas eble rekorda por tiel frua dato en la antaŭkongresa jaro, verŝajne aŭgurante rekorde grandan ekstereŭropan Universalan Kongreson. Ĝis 1980 10 16, registriĝis 672 aliĝoj, el 43 landoj: Brazilo 245; Argentino 73; Francio 34; Nederlando kaj Usono po 29; FR Germanio

27; Svedio 22; Britio 19; Finnlando 17; Japanio 16; Belgio, Bulgario kaj Venezuelo po 12; Hungario kaj Kanado po 11; Hispanio 10; Aŭstrio, Norvegio kaj Pollando po 7; Danlando, Italio, Jugoslavio kaj Svislando po 6; Ĉilio 5; Irlando, Islando kaj Israelo po 4; Aŭstralio, Ĉeĥoslovakio, Kolombio, Luksemburgio kaj Portugalio po 3; Ĉinio, Germana DR, Meksikio, Nov-Zelando kaj Urugvajo po 2; kaj po 1 el Greklando, Indonezio, Korea Respubliko, Liberio, Sud-Afriko kaj Zairio.

Kalendaro

Kio okazos ĝis marto?

Novembro

- 01-02 Kultura Semajnfino, Milano, Italio (Literatura Foiro, via Pantano 17, I-20122 Milano)
- 01-02 Semajnfino de Faulhaber-Fondaĵo, Lage Vuursche, Nederlando (FLE, Dirkslandhof 18, 3086 CC Rotterdam)
- 01-15 Seminarioj por gvidantoj de E-kursoj, Bydgoszcz, Pollando (Esperantotur, Str. M. Skłodowskiej-Curie 10, PL-85-094 Bydgoszcz)
- 01-29 FERIAJ E-kursoj, Smoljan, Bulgario (Internacia E-Kurs-ejo, pk. 791, BG-1090 Sofia)
- 01-29 FERIAJ E-kursoj, Varna, Bulgario (Internacia E-Kursejo, pk. 791, BG-1090 Sofia)
- 06-09 Studenta Forumo, Debrecen, Hungario (SRES, Pf. 193, H-1368 Budapest)
- 07-12 5a Interlingvistika Laborkonferenco, Paderborn, FR Germanio (Eŭropa Klubo, Kleinenberger Weg 16B, D-4790 Paderborn)
- 08-09 Konkurso por radioamatoroj je ĉiuj amatoraj radio-bendoj (H. Welling, DJ4PG, Arnumer Kirchstr. 5d, D-3005 Arnum, FR Germanio).
- 08-15 6a Internacia Foiro de E-Turismo, Warszawa-Bydgoszcz, Pollando (PEA, str. M. Skłodowskiej-Curie 10, PL-85-094 Bydgoszcz)
- 10-14 Studenta E-Konferenco, Lublin, Pollando (Zarząd

Wojewódzki SZSP, E-Rondo, ul. I Armii WP 5, PL-20-078 Lublin)


21-23 Seminario kun 4-nivelaj E-kursoj, Langen, FR Germanio, (M. Führer, 11 Am Stadtpfad, D-6236 Eschborn, Taunus)

Decembro

- 01-28 FERIAJ E-kursoj, Smoljan, Bulgario (Internacia E-Kurs-ejo, pk. 791, BG-1090 Sofia)
- 01-29 FERIAJ E-kursoj, Varna, Bulgario (Internacia E-Kursejo, pk. 791, BG-1090 Sofia)
- 05-07 Internacia E-renkontiĝo, Zakopane, Pollando (Esperantotur, vd. supre)
- 06-16 Vizito al Italio, Milano – Roma (Suno kaj Maro, Via S. Maurillo 7, I-20123 Milano)
- 10 Tago de Homaj Rajtoj
- 15 Zamenhof-Tago (LLZ naskiĝis en 1859)
- 15 Tago de la Esperanta Libro
- 15-25 Lumbildoj kaj kantoj, Lukala, Zairio (E-Instituto de Zairio, B.P. 13, Lukala)
- 20-29 Vizito al Israelo (Suno kaj Maro, vd. supre)
- 21-02/1 Kristnaskaj E-ferioj kaj novjara E-renkontiĝo, Swinoujście, Pollando (Esperantotur, vd. supre)
- 24-31/1 Vintra Restado, Maria Alm, Aŭstrio (Monda Turismo, Troststrasse 27/2, A-1100 Wien)
- 27-01/1 Kunveno de matematikistoj, Budapeŝt, Hungario (F. Lo Jacomo, 14 rue de la Pompe, F-75016 Paris, Francio)
- 27-03/1 24a Internacia Seminario de GEJ kaj 2a Internacia Festivalo por Mezaĝuloj, Kassel, FR Germanio (H-D. Platz, Maikammerer Str. 21, D-6731 St. Martin)
- 27-03/1 Skiferioj kun E-kursoj, Villanders, Italio (Katholisches Pfarramt, Kirchplatz 4, D-7731 Unterkirnach, FRG)
- 28-02/1 10a Vintra Esperantista Ferio, Budapeŝt, Hungario (DK de HEA, Pf. 153, H-1443 Budapest)
- 28-03/1 Silvestra balo, Smoljan, Bulgario (Internacia E-Kurs-ejo, pk. 791, BG-1090 Sofia)
- 28-03/1 Folkloro Renkontiĝo, Toruń, Pollando (Esperantotur, vd. supre)
- 30-03/1 Silvestra balo, Varna, Bulgario (Internacia E-Kurs-ejo, pk. 791, BG-1090 Sofia)
- 31 Kotizoj de la Universala Kongreso altiĝas

Januaro

- 03-26/12 Internacia E-lernejo kun ĉiusemajnaj kursoj, Bydgoszcz, Pollando (Esperantotur, vd. supre)
- 09-10 46a Kongreso de NZEA, Wellington, Nov-Zelando (NZEA, P.O. Box 330, Wellington 1)
- 18-15/2 Vintra E-lernejo, Swinoujście, Pollando (Esperantotur, vd. supre)
- 24-31 Vintra Restado, Maria Alm, Aŭstrio (Monda Turismo, Troststrasse 27/2, A-1100 Wien)



Baldaŭ venos la Tago de la Esperanta Libro – la 15a de decembro. Ĉu vi jam decidis, kion aĉeti por vi mem aŭ iu alia? la Katalogo de UEA donas tiurilate ĉ. 2500 ideojn!

Faru plezuron

al viaj korespondantoj kaj uzu la belan glumarkon de la 66a

UK en Brazilio. Brile orkolora kaj memglua, kun aspekto same modernisma kiel la brazila ĉefurbo mem, ĝi tamen kostas nur po 8,80 (por Nederlando 10,24) gld. por 100 glumarkoj, inkluzive de sendokostoj. Mendu ĉe la Libroservo de UEA aŭ ĉe via kutima liveranto.



Februaro

07-14 22a Internacia Fervojista E-Skisemajno, Bohinj, Jugoslavio (Fervojista E-Societo, Vrazova 60, YU-62000 Maribor)
 22-28 Semajno de Internacia Amikeco
 27-02/3 Karnavala renkontiĝo de JEB, Ramsgate, Britio (JEB, 140 Holland Park Avenue, London W11 4UF)
 28-01/3 Renkontiĝo por esperantistaj virinoj aktivaj, Rotter-

dam, Nederlando (A. Brennan, p/a Nieuwe Binnenweg 197B, 3021 GA Rotterdam)

Marto

13-15 E-filatela konferenco, Valtice, Ĉeĥoslovakio (V. Hasala, CS-691 42 Valtice)
 31 Limdato de la Belartaj Konkursoj
 31 Kotizoj de la Universala Kongreso altiĝas

BUĜETO**DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
POR LA JARO 1981****KOSTOJ****GLD.**

Salajroj malnete	263 100
Sociaj asekuroj pagataj de UEA	53 200
Salajroj nete	316 300
Afranko, telefono, nete	23 400
Presajoj	10 100
Materialoj	9 700
Riparo de maŝinoj	7 000
Trinkaĵoj, revizoroj k.a.	2 800
Oficejo, nete	53 000
Fotokopiado, nete	3 500
Gasoj, elektro, akvo	6 300
Riparo de la domo, purigiloj	4 200
Impostoj, asekuro, je la domo	3 600
Minus lupagoj pro loĝoĉambroj	- 1 900
Oficeja domo, nete	12 200
Preskostoj de "Esperanto" (10x)	34 600
Sendokostoj	37 700
Kovertoj	2 200
Grafikaj k.a. kostoj	32 000
Minus anoncoj	- 14 800
"Esperanto", nete	91 700
Preskostoj de la Jarlibro	17 900
Sendokostoj kaj kovertoj	13 800
Grafikaj k.a. kostoj	12 900
Minus anoncoj	- 11 000
Jarlibro, nete	33 600
Preskostoj "Kontakto"	6 800
Sendokostoj kaj kovertoj	3 900
Grafikaj k.a. kostoj, minus anoncoj	7 800
"Kontakto", nete	18 500
Veturkostoj de la Centra Oficejo (regulaj)	4 400
Vojaĝkostoj kongresaj	16 400
Vojaĝkostoj Estraro de UEA	10 500
Vojaĝkostoj Estraro de TEJO	1 900
Reprezentaj kostoj	2 000
Vojaĝkostoj de komisionoj kaj komisiitoj	2 000
Vojaĝ- kaj restad-kostoj	37 200
Volontula Servo	15 300
Korespondkostoj estraraj kaj komisionaj	7 200
Bankkostoj, kurzperdoj	6 800
Premioj kaj donacoj	6 200
Postpagitaj k.a. kostoj	1 400
Ĝeneralaj kostoj, entute	14 400
Deprezo de la domo, 1%	1 300
Deprezo de maŝinoj kaj mebloj, C.O.	22 600
Deprezoj	23 900
Sumo de la kostoj	626 800

RIMEDOJ**GLD.**

Kotizoj MJ (Membro kun Jarlibro)	21 600
Kotizoj MA (Membro-Abonanto)	201 300
Kotizoj MJ-K (kun "Kontakto")	2 700
Kotizoj MA-K (kun "Kontakto")	9 200
Aligitaj (asociaj) membroj de UEA	19 400
Aligitaj (asociaj) membroj de TEJO	6 900
Simplaj abonoj "Esperanto"	6 400
Kolektivaj abonoj "Esperanto"	22 000
Kongresaj abonoj "Esperanto"	9 300
Abonoj k.a. vendoj de "Kontakto"	4 500
Kolektivaj abonoj "Kontakto"	1 400
Societo Zamenhof	24 800
Kotizoj de fakaj organizaĵoj	1 400
Kotizoj entute	330 900
Donacoj al la Ĝenerala Kaso	14 000
Vendoj de la libroservo	202 000
Minus kostoj de la venditaj varoj	- 132 400
Minus tantiemoj (eldonaĵoj de UEA)	- 5 700
Minus katalogaj k.a. kostoj	- 14 200
Plus triono de fakturitaj sendokostoj	5 900
Libroservo, nete	55 600
Abonoj je nepropriaj gazetoj	7 800
Minus kostoj	- 5 100
Abonservo, nete	2 700
Grafikaj laboroj fintraktitaj en Rotterdam.	60 000
Minus laboroj faritaj ekstere	- 5 400
Grafikaj laboroj Rotterdam, malnete	54 600
Grafikaj k.a. laboroj Antverpeno	109 000
Subvencioj k.a. rimedoj	69 000
Minus salajroj, kompensoj	- 108 000
Minus materialoj	- 20 000
Minus ejaj kostoj (luo, varmigado ktp.)	- 6 000
Minus deprezoj k.a. kostoj	- 21 000
Grafikaj laboroj Antverpeno, nete	23 000
20% de UK-kotizoj	28 300
50% de licencpago IJK	1 000
Kongresoj, entute	29 300
Turismaj aranĝoj	10 000
Rento, nete	39 000
Kurzgajnoj	2 600
Postricevitaj rimedoj	1 400
Vendo de uzitaj poŝtmarkoj	4 700
Ĝeneralaj rimedoj, entute	8 700
Kompensoj el bilanco, de eksteruloj ktp.	59 000
Sumo de la rimedoj	626 800

NOTO: Pro teknikaj kialoj ne eblis aperigi la supran buĝeton en la maja revunumero, kune kun la aliaj financaj aldonaĵoj al la Raporto de la Estraro. Nun estas antaŭ vi ne simple buĝetpropono, kiel en la antaŭaj jaroj, sed la definitiva buĝeto, aprobita de la Komitato.

Pollando

• Laŭ *Pola esperantisto* (kiu minacas venki sian plurjaran malakuratecon), fine de 1979, Pola Esperanto-Asocio havis 7810 membrojn. El tio, pli ol 60% estas virinoj, dum pensiuloj konsistigas ĉ. 20 procentojn de la membraro. En 1979 PEA notis pli ol 900 aliĝojn de novaj membroj, sed ankaŭ samtempan perdon de ĉ. 400 malnovaj membroj. Plej multe kreskis la lokaj filioj de PEA en Lodzo (238 membroj), Bjalistoko (100) kaj Poznano (100). La plej granda membroperdo okazis en Bydgoszcz (337 membroj), sed ĝi eĉ kun tio restas la plej granda filio.

FR Germanio

• Jam de multaj jaroj sentiĝas manko de konvenaj vortaroj por la germanlingvaj esperantistoj. Oni jam en pluraj okazoj reeldonis malnovajn vortarojn, sed tio ne solvis la problemon. Nun la estraro de Germana Esperanto-Asocio decidis starigi laborgrupon, kies tasko estas kompili novan germanan-Esperantan vortaron. Pluraj kompetentaj kunlaborantoj jam anonciĝis. Tamen, pliaj estas tre bonvenaj. La laborgrupon gvidas d-ro Kalckhoff. Pri la teknika kunordigo zorgas: Friedrich B. Hilpert, Rabistr. 18/II, D-8000 München 80, FR Germanio. Al tiu adreso skribu ankaŭ la novaj kunlaboremuloj.

Kolombio

• Ĉi-jare okazis kvar televidaj programoj pri Esperanto en Kolombio. Temis pri tri intervjuoj kaj unu longa informa programo pri la Internacia Lingvo. En la ĉefurbo Bogoto funkcias pluraj Esperanto-kursoj. Kiel aparta stimulo al la kursanoj verŝajne funkcias la principa decido, ke la 2a Tutamerika Kongreso de Esperanto okazu tie en 1982. La unua tiaspeca kongreso estis ĉi-jare en Argentino.



Instruistoj

• La 14a Internacia Konferenco de la edukista faka organizaĵo, Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI), okazis ĉi-jare en Malto. Tie inter la 24a de julio kaj la 1-a de aŭgusto renkontiĝis ĉ. 70 geinstruistoj el ok landoj. La ĉeftemo de la Konferenco estis "Esperanto, ponto al internacia kompreniĝo – Internacia Lingvo por venki analfabetismon". Estas kurioze, ke ILEI aparte traktis "novan skribon" en la kadro de tiu aktuala kaj grava temo. Dum la Konferenco, la Estraro de ILEI estis akceptita ĉe la maltaj ministro pri kulturaj aferoj kaj estro de la instruista sindikato.

Radio

• Ekde la 1-a de novembro ĉi-jare, Radio Pekino elsendos siajn Esperan-

tajn programojn ankaŭ al Sud-Ameriko. La elsendoj okazos ĉiutage inter la 6,30 kaj 7,00 horo matene, laŭ la pekina tempo, kio estas fruaj vesperaj horoj en Sud-Ameriko. La ondoj estas: 32m (9365 kHz) kaj 25,70m (11650 kHz). Ĉio ĉi signifas, ke Radio Pekino nun elsendas en Esperanto kvarfoje tage dum entute du horoj.

Televido

• Intervjuon kun Claude Piron, filmitan dum Eŭropa Esperanto-Konferenco en aprilo ĉi-jare, dissendis la belga televido en sia franc-lingva programo la 30an de aŭgusto. La intervjuo – pri Esperanto – daŭris dek minutojn kaj, pro tre konvena vespera horo, verŝajne atingis tutan milionon da spektantoj.

• La finna nacia televido elsendis 20-minutan programon pri la 36a Internacia Junulara Kongreso de TEJO en Rauma. La elsendo okazis la 14an de septembro, en la kadro de la lingvo-pedagogia programo por plen-kreskuloj. La sama programo ripetiĝis en la finna televido la 21an de septembro.

Virinoj

• Lastatempe ellaborita statistiko montras, ke nur kvarono de la individuaj membroj de UEA estas virinoj. Laŭlande, la plej grandan procentaĵon de virinoj en sia UEA-membraro havas Finnlando (49,6), antaŭ Nov-Zelando (44,26) kaj Nederlando (41,19). Sekvas Pollando, Peruo, Svedio kaj Svislando (30-40), Aŭstrio, Belgio, Britio, Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Danlando, Francio, Israelo, Italio, Jugoslavio, Kanado, Norvegio kaj Usono (20-30). Ĉiuj aliaj landoj havas malpli ol 20 procentojn de virinoj en la individua membraro de UEA.

Persone

Daŝgupto

• D-ro Probal Daŝgupto, kiu dum ok monatoj laboris kiel volontulo ĉe UEA, fine de septembro translokiĝis al sia hejmlando, Hinda Unio. Ĝis la fino de ĉi tiu jaro Daŝgupto lekcios pri lingvistiko en la Universitato de Kalkato, por poste ekposteni en la lingvistika fako de la Universi-



• **Korea Respubliko:** Jen tre freŝa foto pri junulara renkontiĝo, okazinta sur la monto To Bong, apud Seŭlo, inter la 3a kaj 5a de oktobro ĉi-jare. Partoprenis 25 gejunuloj el diversaj koreaj urboj kaj tri eksterlandanoj. La foto, kiun tiel "bele" tranĉis la fotisto kaj ne ni en la redakcio, bone ilustras la ĉefan trajton de la nuntempa vervo pri Esperanto en Korea Respubliko – ĝian junecon.

tato de Puneo, sudoriente de Bombajo. La nuna adreso de d-ro Daŝgupto estas: 47/2A Gariahat Rd., Calcutta 7000019, Hinda Unio.

Jung

- Teo Jung, honora membro de UEA, fondinto kaj multjara redaktoro de *Heroldo de Esperanto*, far-



iĝos 88-jara la 21an de decembro 1980. Jes iom helpe de bastono, sed Jung ankoraŭ bone fartas kaj eĉ vojaĝas. Nia foto montras ges-rojn Agnes kaj Teo Jung (meze) dum feria restado en Bad Neuenahr (FR Germanio), en septembro ĉi-jare, kun ges-roj Kondor, kiuj afable sendis al ni la foton.

Bacelar

- D-ro Armando Bacelar, iama portugala ministro pri socialaj aferoj, estas deputito en la Konstitucia Asembleo kaj portugala delegito en la Konsilio de Eŭropo, kie li membras en la Komisiono pri Edukado kaj Kulturo. Kiel multjara esperantisto, d-ro Bacelar intencas pledi por pli granda atento al Esperanto en la Konsilio de Eŭropo.

Kawasaki

- Prof. Naokazu Kawasaki, akademiano kaj konata japana esperantologo, estis fine de aŭgusto kaj komence de septembro en Ĉinio. Temis pri universitata vojaĝgrupo, en kiu tamen estis kvar esperantistoj. Kvankam prof. Kawasaki renkontiĝis kun kelkaj ĉinaj esperantistoj, li bedaŭras, ke la tempomanko malhelpis okazigi la planitan diskuton pri la kompilaj principoj de la nun preparata Esperanto-ĉina vortaro.

Volontulo por Ĉinio

Pere de la Volontula Servo de UEA, Ĉina Esperanto-Ligo serĉas eksterlandanon, viran aŭ inan, por unujara servo en Pekino. La laboro konsistos el lingva kontrolo kaj revizio de tradukoj faritaj de kunlaborantoj de la revuo *El Popola Ĉinio*, plus gvido de superaj kursoj pri la lingvo. Tial estas postulata tre alta nivelo de lingvoscio ĉe la kandidatoj. Tekstoj, kiujn la

elektita volontulo kontrolis kaj reviziis, devos esti senplue publikigeblaj. Alia necesa kvalifiko estas sperto pri instruado de Esperanto. La kandidatoj estu pretaj mem pagi sian vojaĝon al Pekino.

Siaflanke, ĈEL prizorgos ĉiujn bezonojn en Ĉinio, inkluzive de vizo, laborpermeso, aparta loĝĉambro kun banejo ktp., manĝoj eŭrop- aŭ ĉin-stilaj laŭdezire, dusemajna libertempa vojaĝo tra Ĉinio kaj poŝmono.

Kandidatoj petu pli detalajn informojn kaj respondilon per simpla poŝtkarto al la Centra Oficejo de UEA, Nw Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.



Kekkonen

- Unu el la doĵenoj de la eŭropa publika vivo, Urho Kaleva Kekkonen (sur la apuda foto), prezidanto de Finnlando ekde 1956, festis sian 80an datrevenon la 3an



de septembro 1980. Respondante en oficiala parolado al la multegaj gratulantoj, li interalie memorigis la jularon pri la neceso lerni kaj koni fremdajn lingvojn. La prezidento konstatis, ke li mem ofte spertis malfacilaĵojn pro nesufiĉa lingvoscio. La prezidento ĉiam simpatiis kun la Esperanto-movado, kiu esprimis sian gratulon donacante al li la medalon pri Vilho Setälä — alia "granda oldulo" finnlanda. Prezidento Kekkonen estis la alta protektanto de la 54a Universala Kongreso en Helsinko en 1969.

Oficiala Informilo

N-ro 538

NOVA ĈEFDELEGITO POR FINNLANDO

Laŭ propono de Esperanto-Asocio de Finnlando kaj pro retiriĝo de la ĝisnuna ĉefdelegito Harri Laine, la Estraro de UEA elektis kiel novan Ĉefdelegiton por Finnlando finon Sirkka Salmivaara, Puistokatu 15 b A 25, 20100 TURKU 10; pĉk. Tu 829 49-8. La membroj en Finnlando bv. de nun direkti al ŝi ĉiujn kotiz-

pagojn por UEA. Ni dankas s-ron Laine pro escepte efika plurjara laboro en tiu ofico.

ĈEFDELEGITO ISLANDA NOMITA

La Estraro de UEA unuafoje nomis Ĉefdelegiton por Islando, laŭ rekomendo de Islanda Esperanto-Asocio. Tiu estas la observanto de IEA en la Komitato de UEA, s-ro Hallgrímur

Sæmundsson. Por la kotizperado, ĉefdelegitaj korespondaĵoj k.s. restas valida la adreso de IEA (Pósthólf 1081, IS-101 Reykjavík).

NOVAJ KOTIZPERANTO KAJ ADRESO EN SVEDIO

Post 21 jaroj da akurata perado por UEA en Svedio, la ĝisnuna komisiito de Sveda Esperanto-Federacio, s-ino Ester Andrén, demisiis por transdoni la taskon al s-ino Asta Schaedel (V. Rönneholmsvägen 42 B, S-217 41 Malmö). Kiel antaŭe, la membroj en Svedio povas ĝiri siajn kotizojn al pĉk. 14 74 29-5 je la nomo de Sveda Esperanto-Federacio, Specialkonto, Malmö. Ŝanĝiĝis nur la homo malantaŭ tiu federacia fasado. Ni varme dankas al s-ino Andrén pro la escepte longa servo kaj harmonia kunlaboro. Ekde la 1-a de novembro ĉi-jare la landa asocio de UEA en Svedio havas novan adreson: Sveda Esperanto-Federacio, Brunnsgatan 21, S-111 38 Stockholm. Telefono: (08) 11 74 34.

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Korea Respubliko: Sung-Ho Cho.

SOCIETO ZAMENHOF

FR GERM: 209 Erdmann Fritsch.
BRAZ: 210 Jair R. Peixoto Laguna.
HISP: 211 José Castelltort Riba.
JAP: 212 Toyozo Nisikawa. JUGO-SL: 213 Neven Kovačić. NEDERL: 214 L. Adelaar. NORV: 215 R. Bugge-Paulsen. US: 216 A.F. Doneis; 217 T.H. Goodman.

DONACOJ 1980 (Gld.)

ĝis la 31a de aŭgusto

FONDAĴO AZIO-AFRIKO: Bulgario: Bulgara Esperantista Asocio 500,00. FR Germanio: A. Garcia 109,47. Hinda Unio: P. Daŝgupto 10,00. Italio: Esperanto-Centro Torino 31,20. Nederlando: H.H.

(v. daŭrigon, p. 180)

Kotiztabelo por 1981

Lando/Valuto	(J-)AM	MJ(-K)	MA(-K)	SA	Kto	SZ
Argentino/peso	1150	23000	57500	34500	17250	115000
Aŭstralio/dolaro	0,60	12	30	18	9	60
Aŭstrio/ŝilingo	8	160	400	240	120	800
Belgio/franko	18	360	900	540	270	1800
Brazilo/kruzejro	26	520	1300	780	390	2600
Britio/pundo	0,25	5,00	12,50	7,50	3,75	25,00
Bulgario/guldeno	0,85	17,00	42,50	25,50	12,75	85,00
Ĉeĥoslovakio/krono	6,50	130,00	325,00	195,00	97,50	650,00
Ĉilio/peso	16	320	800	480	240	1600
Ĉinio/guldeno	0,75	15,00	37,50	22,50	11,25	75,00
Danlando/krono	3,80	76	190	114	57	380
Finnlando/marko	2,20	44	110	66	33	220
Francio/franko	2,70	54,00	135,00	81,00	40,50	270,00
FR Germanio/marko	1,20	24	60	36	18	120
Germana DR/guld.	1,10	22,00	55,00	33,00	16,50	110,00
Greklando/draĥmo	22	440	1100	660	330	2200
Hispanio/peseto	35	700	1750	1050	525	3500
Hungario/forinto	9	180	450	270	135	900
Irano/guldeno	0,80	16	40	24	12	80
Irlando/pundo	0,23	4,60	11,50	6,90	3,45	23,00
Islando/krono	460	9200	23000	13800	6900	46000
Israelo/siklo	4	80	200	120	60	400
Italio/liro	460	9200	23000	13800	6900	46000
Japanio/eno	120	2400	6000	3600	1800	12000
Jugoslavio/dinaro	12	240	600	360	180	1200
Kanado/dolaro	0,76	15,20	38,00	22,80	11,40	76,00
Kolombio/peso	18	360	900	540	270	1800
Korea Resp./ŭono	260	5200	13000	7800	3900	26000
Kuvajto/guldeno	1,45	29,00	72,50	43,50	21,75	145,00
Luksemburgo/franko	18	360	900	540	270	1800
Meksikio/peso	9	180	450	270	135	900
Nederlando/guldeno	1,25	25,00	62,50	39,00*	19,50*	125,00
Norvegio/krono	3,20	64	160	96	48	320
Nov-Zelando/dolaro	0,58	11,60	29,00	17,40	8,70	58,00
Peruo/guldeno	0,75	15,00	37,50	22,50	11,25	75,00
Pollando/guldeno	0,90	18,00	45,00	27,00	13,50	90,00
Portugalio/eskudo	20	400	1000	600	300	2000
Soveta Unio/guldeno	0,95	19,00	47,50	28,50	14,25	95,00
Sud-Afriko/rando	0,45	9,00	22,50	13,50	6,75	45,00
Svedio/krono	3,10	62,00	155,00	93,00	46,50	310,00
Svislando/franko	1,20	24	60	36	18	120
Urugvajo/peso	4	80	200	120	60	400
Usono/dolaro	0,68	13,60	34,00	20,40	10,20	68,00
Venezuelo/bolivar	2	40	100	60	30	200

ALIAJ LANDOJ: Laŭ pola tarifo: Hongkongo, Malto, Singapuro. Laŭ irana tarifo: Alĝerio, Bermudo, Bocuano, Irako, Jamaiko, Kostariko, Kubo, Libano, Maŭricio, Panamo, Rumanio, Turkio, Nederlandaj Antiloj. Laŭ ĉina tarifo: Ĉiuj ceteraj landoj ne jam menciitaj. Por ĉiu validas la tarifo de la lando, en kiu tiu loĝas.

(J-)AM = (Juna) Asocia aŭ Aligita Membro (koncernas nur landajn asociojn)
MJ(-K) = Individua Membro kun Jarlibro (kaj ĝis inkl. 25 jaroj, *Kontakto*)
MA(-K) = Individua Membro-Abonanto (kiel MJ(-K), plus revuo *Esperanto*)
SA = Simpla Abono de la revuo *Esperanto*, sen membreco en UEA
Kto = Abono al la revuo *Kontakto*, sen membreco en TEJO
SZ = Kotizo por Societo Zamenhof (ne inkluzivas membrecon en UEA)

*Por Nederlando la prezoj de abonoj (sen membreco) inkluzivas la imposton de 4%.

Antaŭdankon pro la frua pago de via kotizo por 1981! Tiel vi helpas la laboron de la Centra Oficejo.

Weulen Kranenberg 150,00. Kongresanoj Stokholmo (Aŭkcio) 1 598,50. Sumo ĉi-jara 6 176,36.
FONDAĴO CANUTO: Nederlando: H.H. Weulen Kranenberg 100,00. Norvegio: K. Gustavsen 11,57. Svedio: U. Luin 64,71. Sumo ĉi-jara 1 899,98.

FONDAĴO OFICEJA ILARO: Svislando: G.F.Th. Cool 50,00. Nederlando: E.J. Woessink 98,53. Sumo ĉi-jara 7 206,22.

FONDAĴO TEJO: Belgio: M. Dreze 45,00. Nederlando: H.H. Weulen Kranenberg 250,00. Diversaj malgrandaj 1,00. Sumo ĉi-jara 651,86.

ĜENERALA KASO: Belgio: C. Vanbiervliet 50,00. Britio: R.H. Thresher 51,08. FR Germanio: E. Feist 49,49. Nederlando: Anonime 10,00; R. Moerbeek 400,00; H.H. Weulen Kranenberg 100,00. Diversaj

malgrandaj 16,64. Sumo ĉi-jara 2 686,46.

NOV-JORKA OFICEJO: Patronoj (minimуме \$100): Kanado: Charles E. Carson; Bruce R. Crisp. Amikoj (minimуме \$10): Kanado: Crawford Baker; G. Ewart Brown (\$86,32); F.C. Kirk Crockett; W.D. Hackett (\$15); Frank G. Hanson; Edward Laufer; H.J. Lewis; Alice L. Maier; William Maier; F.O. Meyer III; Andy McNamee; D. Westgaard; U.P. Ronald. Usono: Reginald Jaderstrom; Helmut Kimpel (\$25); Adolf Kokol; Gertrude Novak. Sumo ĝisnuna: 14 352,00 gld.

PATRONOJ DE TEJO: 34 A. Fighiera, Hispanio. 35 S. MacGill, Nederlando. Por 1981: 1 S. MacGill, Nederlando.

Al ĉiuj tre koran dankon! UEA

ekzameno
 Redaktas: B. Golden,
 Csikász u. 11.III.3
 H-8200 Veszprém, Hung.

DEMANDO 36 (la respondo aperos en nia novembra numero)

Okaze de la 65a Universala Kongreso ĉi-jare en Stokholmo, esperantistoj certe havis okazon informiĝi pri la historio de la Esperanto-movado en la gastiga lando. Mezuru la amplekson de via scio pri Esperanto en Svedio per jenaj dek demandoj, kiuj konsistas el dato, urbnomo kaj kelkaj vortoj aludantaj al okazintaĵo en tiu loko. Ĉu vi povas aldoni detalojn por identigi la eventojn kaj partoprenintojn?

1. 1889 - Ystad - lernolibro
2. 1895 - Uppsala - ekapero de grava periodaĵo
3. 1899 - Köping - naskiĝo de elstara funkciulo de IEL kaj UEA
4. 1928 - Gotenburgo - internacia kongreso
5. 1933 - Stokholmo - internacia kongreso
6. 1934 - Stokholmo - internacia kongreso
7. 1948 - Malmö - internacia kongreso
8. 1956 - Frostavallen - starigo de principaro
9. 1967 - Borås - morto de hungar-devena svedo
10. 1969 - Tyresö - deklaracio

**LA VIRO
 EN LA MORTOTUKO,**
 de episkopo Sven Danell, traktas la novajn sciencajn faktojn, kiuj parolas por la aŭtentikeco de la mortotuko, kaj ankaŭ detale klarigas la cirkonstancojn ĉirkaŭ la suferado kaj morto de Jesuo. **Prezo:** Skr. 25,00, je antaŭpago — afrankite. **Förlag Gröna Stjärnan,** Landerigat. 7, S-416 70 Göteborg, Svedio. Poŝtĉekkonto 8 84 51-0.

Anoncetoj

TARIFO: Ĉiu vorto kostas 0,80 guldenojn (unu internacian respondkuponon). Pri la enhavo de la anoncetoj respondecas nur la anoncantoj mem, kiuj bonvolu memori, ke ni ne donas rabaton pro la ripetado de la anoncetoj.

Metu vian lokan grupon sur la mapon per anonceto en la Jarlibro. Informoj pri lokaj grupoj (adreso, telefonnumero, dato de regulaj kunvenoj ktp.) aperas sub la rubriko pri la koncerna urbo. Prezo: 1/10 de via landa MA-kotizo por ĉiu preslinio. Mendu antaŭ la fino de novembro.

Cerny-Esperanto organizas leter-vesperon por la lernejoj (10-12 j.) ĉirkaŭ la 15a de novembro. Filatele afrankitajn bildkartojn la gejunuloj sammaniere mem respondos. Precizigu duvorte staton, profesion, hobion por laŭfaka disdonado. Laŭeble sekvos poste detala raporto al la skribintoj. Bonvolu sendi al: Ecole Primaire, Place Zamenhof, F-91590 Cerny, Francio.

Tradukistoj/tradukantoj! Mi deziras fondi Internacian Asocion de Esperantistaj Tradukistoj. Bonvolu skribi al mi: s-ro Zbigniew Czupkaŭo, PL-24-220 Niedrzwica Duża, Pollando.

Ĉu vi scias, kiuj Moroni kaj Mormono estis? Ĉu vi sciis, ke Nia Ĉiela Patro parolas nuntempe, same kiel dum Bibliaj tempoj? Vi informiĝu! Skribu: Por-Esperanta Mormonaro, Box 7222, University Station, Provo, Utah 84602, Usono.

Koran dankon al gesamideanoj de 30 landoj, kiuj sendis belajn kartojn okaze de nia ekspozicio kaj tiel helpis al ĝia sukceso. Bedaŭrinde, ni ne povas vin persone danki. Varmajn salutojn. "La Norda Stelo", Hamar, Norvegio.

Eksport-Kompanio serĉas kontaktojn kun importistoj tutmondaj. Ni eksportas ledajn valizojn, ledajn ŝuojn, kvarcajn horloĝojn kaj aliajn varojn. Ni ankaŭ establis servo-fakon por individuaj esperantistoj. Skribu al: Espero Enterprises, Rm. 818, Li Po Chun Chambers, 185-195, Des Voeux Road, Central, Hongkongo.

Tutmonda Esperantista Adresaro: Ĉiu esperantisto, ĉiuj esperantistaj asocioj, entreprenoj ktp. aperigu siajn adresojn en TEA — tio kostos neniom al ili! Vi devas nur plenigi kaj resendi respondilon, kiun ni sendos al vi kontraŭ unu internacia respondkuponon. Info-Servo, Bismarckstr. 28, D-3550 Marburg, FR Germanio.

Paulina Lazarova, 28 jara, bibliografino, Han Omurtag 62, 1504 Sofia, Bulgario, posedas pli ol 4000 kalendarojn. Proponas interŝanĝon — peco kontraŭ peco.

La plej ampleksa serio de sciencaj verkoj

originale verkitaj en Esperanto pri

kemio
biologio
psikologio
sociologio
matematiko ktp.

SUK

Laste aperis:

Sociologio: ĝia historio kaj problemoj de P. Forster, 330 bf.

La cetacoj de W. De Smet, 245 bf.

Kiel personeco sin strukturas de C. Piron, 290 bf.

Enkonduko al literatura kritiko de G. Silber, 275 bf.

Rabato por studentoj kaj revendistoj.
Kompleta listo havebla ĉe: Someraj Universitataj Kursoj (aspc), BP 9, B-4000 Liège X, Belgio. Pĉk. 000-0185091-15.

Ĉiuj eldonaĵoj de SUK estas aĉeteblaj ankaŭ ĉe la Libroservo de UEA.

ĈU VI JAM MALKOVRIS ĈI TIUN
UNIKAN PERIODAĴON EN LA
INTERNACIA LINGVO?

MONATO

internacia magazino sendependa

Eldonanto: Torben Kehlet / STAFETO

Ĉefredaktoro: Stefan MAUL

40 paĝoj DIN A4, riĉe ilustrita. Dek unu kajeroj jare. Jara abono: 49,50 gmk aŭ 800,- b.fr. La abonon bonvolu sendi rekte al la eldonejo: TK/STAFETO p.v.b.a., Miksebaan 65A, B-2130 Brasschaat, Belgio. Poŝtĉekkonto je la nomo de la eldonejo estas: 000-0422856-33.

Se vi ankoraŭ ne estas abonanto de "MONATO", petu provekzempleron kontraŭ du internaciaj respondkuponoj. (Vi tamen memoru, ke unu persono povas nur unufoje fari tian peton). Antaŭdankon!

Savu nin

per starigo de la

SUPERDEMOKRATA MONDORGANIZO!

♦ Esp/34


Neniam forgesu, politika kliento, ke via proksimularo estas, strukture, la konstanta kompletigo de vi mem, komencante de via geedzeca kunul(in)o. Jen la kialo de la kristana penso "Amu vian proksimulon kiel vin mem." Pro tio konvenas ĉiam superregi la propran egoismon.

♦ Esp/35

Winston Churchill asertis, ke Demokratio estas, politike, abomeninda sistemo – aldonante, tamen, ke li ne konas alian malpli barbaran kaj rifuzindan. Same, la du miliardoj kaj duono da homoj kunvivintaj kun li ne konis politikan sistemon nesovaĝan. Estis ilia devo serĉi tra la mondo pintan spertulon kun tiu solvo jam en la manoj. Sed ĉiu el ili pretendis mem esti la Leonardo de la politiko, aplombe fidante la politikan akrecon de sia propra laika cerbo. Tion milionoj da homoj pagis amare pro la fiaj konsekvencoj de tiu plenkulpa malhumila sinteno, kiu sisteme malutilis jam dum jarmiloj, sen lerni ion de la lavango da kompatindaj viktimoj.

♦ Esp/36

La Superdemokratio dividas la homojn en unuojn politike aktivan kaj pasivan; ĝi do dividas la klaseton vere trentantan disde la klasego vere trenata. Ĉi-lastaj personoj estas cerbe manovrataj kaj manipolataj. Al la trenata klaso apartenas homoj klerigintaj en cent mil profesioj, kaj tial ne klerigintaj sufiĉe en la politiko. Temas pri politikaj laikoj aŭ blinduloj, kiuj devas roli nur kiel klientoj tiufake, por ne malutili al si mem pro propra tiufaka nesperteco. Sed ne facile estas subordigi la klaseton al la intereso de la klasego. Ĝenerale la eta klaso misservis la interesojn de la amaso. La klaseto de la kompetentuloj submetiĝos al la saĝo kaj al la intereso de la politikaj klientoj ĉiulandaj nur per Superdemokratio.



MONDHARMONIIGA INSTITUTO
VIA SPORT 18, I-40065 PIANORO, ITALIAO

EL POPOLA ĈINIO

**BONA INFORMO
20% DA RABATO**

La abonvarba kampanjo de *El Popola Ĉinio* por 1981 jam komenciĝis. Ekde 1980 10 15 ĝis 1981 01 31 estas ĝia periodo kaj dume farante abonon aŭ reabonon al la gazeto oni povas profiti 20%ojn da rabato el jena tarifo. Ne perdu la ŝancon, tuj abonu kaj varbe abonigu viajn parencojn kaj amikojn! Kiel abonvarbanto vi povos ricevi de la Esperanta Sekcio de Guoji Shudian ĉinstilajn rekompencojn.

Abontarifo:

12 n-roj (1 jaro)	£3,00	US\$ 6,00	Gld. 12,60
24 n-roj (2 jaroj)	£5,00	US\$10,00	Gld. 21,00
36 n-roj (3 jaroj)	£7,50	US\$15,00	Gld. 31,50

Tuj abonu ĉe: Universala Esperanto-Asocio
Nieuwe Binnenweg 176
3015 BJ Rotterdam
Nederlando

aŭ rekte ĉe la Esperanta Sekcio de Guoji Shudian,
P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio.

ESPERANTO NE ESTAS LINGVO EVOLUCIA,

sed fiksa, stabila, principe perfekta sur la universala, nevaria fundamento de LOGIKO, kiun, laŭ Zamenhof, sole nur oni devas obei. Nur fiksa lingvo taŭgas por internacia.

Legu kaj juĝu la revoluciajn verkojn de Mimó:

Kompleta Lernolibro de Regula Esperanto
Perfekteco de la Esperantaj Verboj

Du komedioj, de Carles Soldevila: *Tamen civilizitaj* kaj *Neĝobulo*

DON JUAN' TENORIO, de Zorrilla. Ĝus eldonita. La plej fama hispana versa teatraĵo, perlo de la monda literaturo, tradukita sen la tradiciaj eraroj.

"Kion mi admiras ĉe via sintenado, tio estas, ke Esperanto estas por vi ne homa limigita faritaĵo, kiel, ekzemple, maŝino, ankaŭ se tiu estus ekstreme komplika, sed pli vere kreaĵo, organismo, kies ecoj transcendas la inventinton kaj kies sekretojn kaj misterojn oni devas esplori. Tia esploro ŝajnas al mi la neforigebla kondiĉo por plifirmigi la internaciecon, la praktikecon kaj ankaŭ la spiritan belecon de nia lingvo."

Rikardo Schulz

SOMERAJ UNIVERSITATAJ KURSOJ,
asocio sen profita celo, serĉas

universitatajn lekciistojn

por siaj venontaj sesioj. Ĉiufaka propono pritraktota. SUK, BP 9, B-4000 LIEGE X, BELGIO.



Havigu al vi raran artaĵon

Esperanto-Asocio de Finnlando eldonis medalon honore al d-ro Vilho Setälä, honora prezidanto de EAF, honora membro de UEA, akademiano, verkisto, esperantologo ktp. La medalo estas duflanka, 7-centimetra, kaj farita el solida bronzo: ĝi pezas kvaronan kilogramon. La medalon, artaĵon unikan en Esperantujo, kreis konata finna skulptisto Heikki Varja.

La eldonkvanto de la medalo estas strikte limigita je 500 ekzempleroj. Tamen, ankoraŭ vi povas havigi ĝin al vi. Ĝi kostas 120 finnajn markojn plus 10% por la sendokostoj. Mendu pagante la prezon al pĉk. n-ro 23082-5 de Esperanto-Asocio de Finnlando, Postilokero 48, SF-00131 Helsinki 13, Finnlando.

Mendebla ankaŭ ĉe la Libroservo de UEA, Nw Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Prezo: 66,00 gld. + 10% por la sendokostoj (kaj — nur por loĝantoj de Nederlando — plus 18% por la enlanda imposto). La mendojn bv. titoli "Medalo Vilho Setälä".